

Bulgara Esperantisto

Junio 1989



ENHAVO

- 7 Gratulojn, samideano Aleksiev!
- 9 Ĉepelare bonvenigas vin! (Maria Jankova)
- 12 El la malnovaj paĝoj
- 13 Kiam mi estis ĉefredaktoro... (Kunĉo Vălev)
- 15 Katalogo de E-eldonaĵoj
- 19 100 jarojn Esperanto-periodaĵoj en Bulgario (Canko Murgin)
- 23 Verdaj steletoj
- 25 Por nia lingva perfektigo (Violin Oljanov)
- 26 Poezio (Boris Hristov)
- 28 Enlanda movado
- 29 Tra la mondo
- 29 Junulara etoso en Ateno (Atanas Ilkov)
- 31 Tra la gazetaro (Krâstju Karucin)
- 32 Deziras korespondi
- III Modo (Mila Mladenova)
- IV Distroj

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimităr HAĜIEV, Krâstju KARUCIN, Kunĉo VĂLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: „Hristo Botev“ 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio


Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkita nur en Esperanto, tajpita aŭ klare skribita. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla nur per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por la ceteraj landoj — 7.80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0.50 lv. aŭ 3 ned. gld.

Estas organizita regula surbendigo de „Bulgara Esperantisto“ por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Junulara Rok-Kantgrupo „Nuanco“ — Jambol, provludas.

Al la atento de la E-societoj kaj E-Kulturdomoj



INTER LA KONKLUDOJ KAJ ESPEROJ

Komparante la rezultojn de la lastaj abonkampanj (1987 kaj 1988), ni ĉiuj — redakcianoj, kunlaborantoj kaj legantoj, povus esti kontentaj pri la rezultoj. La legantaro de „Bulgara Esperantisto“ plimultiĝis je 104 personoj. Ĝojiga tendenco estas ankaŭ la pligrandigo de la nombro de niaj eksterlandaj legantoj. Sed parto de ili ekscias pri nia revuo ekster la abonkampanj limdatoj, pro kio ili ne sukcesas estiĝi niaj abonantoj por la koncerna jaro kaj devas atendi la venontan.

TIAL LA REDAKCIO SERĈAS SPERTAĴN, ESPERANTISTOJN, ALILANDAĴN, KIUJ PRETAS ESTIĜI NIAJ PERANTOJ. ILI RICEVOS 25% DE LA KOLEKTITA ABONSUMO.

Se ni trafolumus la donitaĵojn pri abonantoj de „BE“ por 1988, ni povus fari kelkajn konkludojn.

● **Plej multajn legantojn „BE“ havas en jenaj urboj: Sofio, Ruse, Ŝumen, Varna, Plovdiv, Veliko Târnovo. Tradicie multaj abonantoj estas ankaŭ en Vraca, Pazarĝik kaj kompreneble en Gâlâbovo kaj Polski**

(Daŭrigo sur paĝo 6)



Jaro 58

N-ro 6

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

VENAS NOVAJ ARTAJ TENDENCOJ...

● **NACIA REVUO DE ESPERANTAJ KANTO KAJ PAROLO EN STARA ZAGORA**



Beroe, Aŭgusta Trajana, Vereja, Irinopolis, Boruj, Eski Zaara, Ĵeleznik... tio estas nur parto el la nomoj de nuntempa Stara Zagora, travivinta dum la miljaroj glorajn kaj dramajn historiajn periodojn. La urbo de l'tilioj kaj poetoj, de sangoverŝaj bataloj por nacia kaj sociala liberigo, kruciĝo de gravaj trafikvojoj de la Okcidento al Oriento, ĉiam ludis signifan rolon en la soci-politika kaj kultura vivo de Bulgario, aldoninta al sia gloro dum la lastaj kelkdekjaroj ankaŭ disvolviĝon de plej modernaj scienc-teknikaj branĉoj.

La 1-an kaj 2-an de aprilo ĉi-jare Stara Zagora, droninta en delikata verdaĵo de ekfloriĝintaj arboj kaj ĝardenoj, gastigis pli

ol 650 partoprenantojn kaj gastojn de XX Nacia Revuo de Esperanto-Kanto kaj Parolo, organizita de la komisiono pri Kultura Agado ĉe CE de BEA. Dommastris Esperanto-Kulturdomo kaj E-societo „Verda Stelo“ en Stara Zagora.

La 31-an de marto en la urba Domo de Ĵurnalistoj okazis gazetara konferenco, kiun partoprenis reprezentantoj de amaskomunikiloj kaj soci-kulturaj organizaĵoj el la urbo kaj regiono. La ĉeestantoj estis informitaj pri la atingoj de bulgara Esperanto-movado, pri la karaktero kaj ĝisnunaj rezultoj de la naciaj revuoj de E-kanto kaj parolo kaj pri la programo de la koncerna aranĝo.

En belege ornamita per Esperantaj afiŝoj, emblemoj kaj sloganoj salonego de Sindikata Domo pri Kulturo la 1-an de aprilo posttagmeze okazis la solena inaŭguro. Per himno „La Espero“ kaj mallonga kantprogramo la Turista Ĥoro el St. Zagora malfermis la solenaĵon. Prezidanto de Esperanto-Kulturdomo Petko Bonev prezentis al la ĉeestantoj la oficialajn gastojn kaj la membrojn de ambaŭ ĵurioj.

Per korvarmaj salutvortoj sin turnis al la ĉeestantoj Sava Dălbokov — Prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, kiu donis altan pritakson de tiu tutlanda E-manifestiĝo kaj bondeziris sukcesojn en la nobla arta konkurado. Salutparolis ankaŭ Toŝo Ĥristozov — prezidanto de la Urba



Sceno el la spektaklo de BET „Fabelo pri la kalpakoj”

Konsilantaro pri Spirita Disvolviĝo, Elzbieta Cwalińska — operkantistino el Pollando, Drahomír Kočvara el ĈSSR kaj Jozef Guido Oortman el Belgio.

La starton de la revuo-konkurso donis per mallonga salutkoncerto Infana Knabina Ĥoro el Pleven kaj Elzbieta Cwalińska per ario el opero „Karmen”.

Dum pli ol du horoj sur la podio sin prezentis ĉirkaŭ dudek apartaj plenumantoj — per individuaj recitaĵoj, kolektivaj prezentadoj (literatur-muzikaj muntaĵoj, kant-ensembloj, korusoj, k. a.) kun variaj, buntaj programeroj. Elstaris Kvarteto el Velingrad; Kantgrupo el Ĉepelare (kies plenumojn akompanis kunkantante ĉiuj ĉeestantoj en la salono); individuaj kaj kolektivaj plenumoj de esperantistoj el vilaĝo Tenevo, departemento de Burgas; Ĉambra Ensemblo el Târgoviște, prezentinta faman folkloran bulgaran kutimon „lazaruvane” (festado de Lazar-Tago); Iva Cvetkova,

lernantino el Botevgrad, la Rok-Kantgrupoj el Jambol „Nuanco” kaj „Ruĝaj Fajreroj”; la Knabina Kantensemblo el Pleven; la Ĥoro de Nevidantaj Esperantistoj kaj tiu de la Centra Esperanto-Kulturdomo el Sofio sin prezentis je alta artnivelo kun bonegaj solistoj.

Estis vera plezuro ĉeesti tian unikan artan koncerton de esperantistoj el diversaj generacioj el ĉiuj partoj de la lando, ambicie sin preparintaj por tiu plej amasa kaj impona E-aranĝo en la jarplano de BEA. Oni sentis, ke la iama naiveco kaj malaltnivela, preskaŭ primitiva maniero de plenumado plu ne ekzistas. Sed nenia miraklo! La okazigitaj dum la pasinta jaro regionaj revuoj de E-kanto kaj parolo en Plovdiv, Loznica, Pleven kaj Blagoevgrad estis vera elprovo de la lingvaj kaj artkapabloj de la partoprenantoj, siaspeca filtrilo kaj selekto de la plej bonaj. En Stara Zagora sin prezentis nur premiitoj en la anticipaj konkursoj, kio altigis la revuan nivelon kaj estis demonstro de vere artaj

atingaĵoj. Tiu nova sistemo estas reala renoviga blovo ankaŭ en niaj asociaj aranĝoj, kiu nepre stimulas ĉiujn dezirantojn kaj organizantojn al partopreno en la estontaj konkursoj serĉi novajn formojn de sinpresentado, la helpon de spertuloj kaj fakuloj, altigi la kriteriojn de selektado. Ĉio ĉi estas ankaŭ fruktodona rezulto de la aktivado de la novekreitaj E-Kulturdomoj en diversaj urboj.

La unua parto de la revuo, post mallonga paŭzo, finiĝis per la teatraĵo „Fabelo pri la kalpakoj” de Panĉo Panĉev, prezentita de Bulgara Esperanto-Teatro. Ĝi provokis la admiron de la spektantoj pere de la majstra plenumo de aktoroj Luna Davidova, Belka Beleva, Veneta Zjumbjuleva, Nikolaj Uzunov kaj Teo Jurukov. Kiel sciante, BET rikoltis novajn sukcesojn per la sama prezentado dum la 73-a UK de Esperanto en Rotterdam pasintjare, pri kio ni legis multajn laŭdajn recenzojn kaj opiniojn. La altnivelaj prezentadoj de BET jam estas ne nur senduba fenomeno en la internacia E-

movado, sed ĝia ekzistado estas nedisigeble ligita kun la historio de la movado.

La 2-an de aprilo la partoprenantoj en la konkursa programo sin prezentis en du apartaj lokoj: unua kaj dua grupoj — en legejo „Kliment Ŭhridski” antaŭ ĵurio, prezidita de la aktorino Ivanka Dakovska el la Nacia Junulara Teatro en Sofio; tria kaj kvara grupoj — en la Urba Domo de Kulturo antaŭ ĵurio ĉekape kun Kunĉo Vălev, prezidanto de la Komisiono pri Kultura Agado ĉe CE de BEA. Ankaŭ tiun tagon la ĉeestantoj en ambaŭ salonegoj ĝuis originalajn artajn individuajn kaj kolektivajn plenumojn. Speciale menciindas tiuj de niaj delonge konataj E-poetinoj Stamenka Dimitrova el Botevgrad kaj Penka Papazova el Jambol, la belega kantado de dueto Bonka Stefanova kaj Elena Koĵuĥarova el Varna, la Virina Ĉambra Ensemblo el Gorna Orjaĥovica, la Lernejana Kantgrupo „Verda Stelo” el Sofio, la Kantgrupo kaj Pupteatro el



Rok-Kantgrupo „Ruĝaj Fajreroj” — Jambol, prezentas sin.



Kantas Sofia E-Horo

Karnobat, la Kantensembloj el Târgoviște kaj Blagoevgrad... Ĉu mi povus elnombri kaj pritaksi ĉiujn?!.. Ja la ĵurianoj mem estis

embarasitaj pri siaj opinioj kaj selekto de la plej bonaj. Eble la rekomendoj de D. Bozaĝieva el Centro pri Amatora Artagado en Sofio estis plej justaj — unuigi la distingojn de la premiitoj en tri ĉefajn grupojn: 1) elstaruloj, 2) perfektuloj kaj 3) bone sin prezentintaj. Pro tio la anonco de la premioj provokis fortajn emociojn!..

Nun mi donas la parolon al Kunĉo Vălev por ĝeneraligi la rezultojn de la XX Nacia Revuo de Esperanta Kanto kaj Parolo en Stara Zagora.

— La membroj de ambaŭ ĵurioj — li diris, — konsideras la revuon sukcesa pro la ambicia kaj altnivela partopreno de impresiga nombro de plenumantoj. Novaj momentoj en tiu revuo estis pli modernaj manieroj de plenumado, kiel ekz. tiuj de la kantgrupoj el Karnobat, Jambol, k. a. Rompiĝas, do, la malnovaj, tradiciaj formoj, en niajn revuojn venas novaj artaj tendencoj. Sed ni ne forgesu, ke preskaŭ ĉiuj estas neprofesiaj aktoroj kaj muzikistoj kaj pro tio ili ne devas subtaksi la necesan tempon por sinpreparo! Oni facile povas diveni la ĉeeston de specialistoj helpintaj la artan kaj lingvan plenumadon de individuaj aŭ de kolektivaj partoprenintoj kaj tion ni insiste rekomendas al ĉiuj!

En sia konkluda parolo la Prezidanto de BEA Sava Dălbokov gratulis ĉiujn distingitojn kaj esprimis sian dankon al la Esperantaj societoj kaj publikaj organizaĵoj en Stara Zagora pro ilia fervora laboro kaj helpo por la modela organizado de la festivalo. Li rekomendis apartajn grupojn doni prezentaĵojn kaj koncertojn en diversaj loĝlokoj antaŭ ne-esperantista publiko por elmontri siajn artajn kaj lingvajn atingojn kaj kontribui por altiro al nia movado de novaj adeptoj de Esperanto.

La XX Nacia Revuo de Esperantaj Kanto kaj Parolo estis respegulita en la regionaj kaj centraj amaskomunikiloj. Bulgara Televido elsendis specialan raportaĵon en la centra vespera emisio „Tra la mondo kaj ĉe ni“ tuj post la oficiala fermo de la festivalo.

*Stara Zagora — Sofio,
en aprilo 1989*

Donĉo ĤITROV

PREMIITAJ PARTOPRENANTOJ

LERNANTOJ ĜIS LA OKA KLASO
INKLUZIVE

A. ARTA PAROLO

A. INDIVIDUAJ

1. superuloj

Hristian Hristov — Ŝumen

Gergana Bangieva — v. Rakitovo, dep. Plovdiv

2. distinguloj

Marinela Georgieva — Târgoviște

3. bone prezentintaj sin

Neli Dejanova — Razgrad

Dimităr Tričkov — Plovdiv

B. KOLEKTIVAJ

1. superuloj

Pupteatra trupo — u. Karnobat

2. distinguloj

Ensemblo — v. Rakitovo

3. bone prezentintaj sin

Ensemblo — u. Svoge

B. MUZIKO

A. INDIVIDUAJ

1. superuloj

Jivka Jeljazkova — v. Tenevo, dep. Burgas

Elena Ivanova — 108 lernejo, Sofio

Dimitrina Stefanova — u. Razgrad

2. Distinguloj

Nikolaj Kolev — v. Tenevo, dep. Burgas

3. bone prezentintaj sin

Anelija Ĉakalova — u. Letnica, dep. Loveĉ

Stojno Dimitrov — 108 lernejo, Sofio

B. KOLEKTIVAJ

1. superuloj

Junpionira ĥoro — Pleven

Junpionira ĥoro — Târgoviște

2. distinguloj

Folkloro grupo (popolkutimo „lazaruvane”) — u. Razgrad

Folkloro grupo — v. Tenevo

Folkloro grupo — Botevgrad

Kantgrupo — Burgas

Kantgrupo — Gabrovo

3. bone prezentintaj sin

Kantgrupo el 108 lernejo — Sofio

Kantgrupo el u. Jambol

MEZLERNEJANOJ KAJ CIVITANOJ

A. ARTA PAROLO

A. INDIVIDUAJ

1. superuloj

Penka Papazova — propraj verkoj — civitanino, Jambol

Paraškeva Bojaĝieva — propraj verkoj — civitanino, Plovdiv

Dančo Danĉev — propraj verkoj, civitano, Plovdiv

Maria Manolova — recitado — civitanino, Sofio

2. distinguloj

Nina Pekina — lernantino, Miĥajlovgrad

Bojanka Josifova — instruistino, Burgas

Velička Vodeničarova — instruistino, Velingrad

Stamenka Dimitrova — civitanino, Botevgrad

Dimităr Petkov — civitano, Gorna Orjaĥovica

Boris Bodiĉec — civitano, Varna

3. bone prezentintaj sin

Conka Stojanova — lernantino, Sofio

Maria Taljokova — lernantino, Pomorie, dep. Burgas

Zaĥarinka Damjanova — lernantino, Bregovo, dep. Vidin

Rosijka Ivanova — civitanino, Târgoviște

Mariana Dikova — civitanino, u. Bjala Slatina, dep. Miĥajlovgrad

Tonĉo Vălev — civitano, Stara Zagora

B. KOLEKTIVAJ

1. distinguloj

Teatra trupo — civitanoj, Stara Zagora

Ensemblo — gelernantoj, u. Ĉepelare, dep. Plovdiv

Ensemblo — gelernantoj, u. Pomorie, dep. Burgas

B. MUZIKO

A. INDIVIDUAJ



Jurianoj kunsidas

1. superuloj

Ĉavdar Gergov — lernanto, Miĥajlovgrad
Desislava Gergova — lernantino, Miĥajlovgrad
Petăr Fidanov — lernanto, Jambol
Bonka Stefanova — civitanino, Varna
Elena Kojufarova — civitanino, Varna

2. distinguloj

Petja Nikolova — civitanino, Burgas
Maja Stojanova — civitanino, Botevgrad

3. bone prezentintaj sin

Ganka Ruseva — lernantino, v. Tenevo
Maria Pančeva — lernantino, Botevgrad

B. KOLEKTIVAJ

1. superuloj

Ĥoro de nevidantoj — miksa, civitana, Sofio
Ĥoro „Rodna pesen” — miksa, civitana, Târgoviște
Ĥoro ĉe Centra Esperanta Kulturdomo — miksa, civitana, Sofio

Ĉambra Kantensemblo — virinoj, u. Blagoevgrad
Folkloro Kantensemblo — miksa, civitana, Botevgrad
Junulara Ensemblo „Nuanco” — Jambol

2. distinguloj

Kantgrupo „Verda Stelo” — 4 lernejo „Vapcarov”, Sofio
Junulara Kantensemblo „Ruĝaj fajreroj” — Jambol
Folkloro grupo — gelernantoj, v. Tenevo
Ĉambra Virina Kantensemblo — G. Orjaĥovica
Virina Kvarteto — u. Velingrad
Kantensemblo de nevidantoj — miksa, Plovdiv

Prezidanto de la ĵurio por la malgrandaj:
Ivanka Dakovska, aktorino

Prezidanto de la ĵurio por mezlernejoj kaj civitanoj: Kunčo Vălev — prezidanto de Centra Esperanta Kulturdomo, Sofio

Temo de la numero 11/1989

De kiam ekzistas la mondo devenas ankaŭ la homa kulturo. Por difini ĝin la sciencistoj uzas multajn nociojn. Dum la pli ol unujarcenta evoluo de Esperanto-movado disvolviĝas ankaŭ ĝia kulturo.

La demando pri la E-kulturo estas diskutinda. Kio estas Esperanta kulturo? Ĉu ekzistas tiu nocio?

La temo de la numero 11/1989 „Esperanta kulturo kaj amatora arto” traktos ne nur teorie la demandon, sed ankaŭ ampleksos la problemon pri la Esperanta amatora arto, speciale pri la bulgara. Multajn jarojn okazas naciaj kaj regionaj festivaloj kaj revuoj de Esperanto-parolo kaj kanto. Per kio tiuj forumoj vigligas nian movadon? Kion vi rekomendus pri ilia organizo kaj statuto?

Ne atendu trankvile la temon de numero 11/1989 — „Esperanta kulturo kaj amatora arto”, sed aktive kunlaboru!

Ni atendas viajn leterojn ĝis la 1-a de septembro 1989.

INTER LA KONKLUDOJ KAJ ESPEROJ



Trâmbeș pro la vigla Esperanto-movado en tiuj loĝlokoj. Kaj tio pleje rilatas al Gălâbovo kaj Polski Trâmbeș, kie koncentriĝis eble plej multaj esperantistoj kompare kun la nombro de loĝantoj.

● La statistiko ankaŭ informas, ke la revuon ricevas diversaj publikaj organizaĵoj kaj sciencaj institutoj, kio pruvas intereson al Esperanto flanke de ne-esperantistaj instancoj.

● Plivigliĝis la kontaktoj inter la Redakcio kaj esperantistaj societoj en la loĝlokoj, kie

funkcias E-Kulturdomoj kaj agadas etatuloj de BEA. Je ilia helpo dum la venonta varbkampanjo ni ankaŭ esperas.

La Redakcio esprimas sian dankon al niaj aktivaj perantoj: s-roj Yoshiaki Mizuno (Japanio), Paul Hewitt (Britio) kaj Adonis Gonzales Meana (Hispanio).

Fine jen la

KOLEKTIVAJ PREMIOJ

al E-societoj, varbintaj plej multe da abonantoj por „BE”:

● E-societo „Ĥristo Kozlev” — Polski Trâmbeș;

● E-societo „Kolombo de la Paco” — Gălâbovo;

● E-societo „Stefan Minkov” — Sofio (Komunumo „Krasna Poljana”), kie el 40 membroj 36 estas abonantoj de la revuo.

Tiuj tri societoj ricevas senpage revuon „Bulgara Esperantisto” dum 1990. Gratulojn!

Pro nesufiĉa aktivado dum la abonkampanjo’89 individuajn premiojn ni ne aljuĝis. Ni esperas, ke en la venonta varbkampanjo partoprenos pli da volontuloj, por ke pli da esperantistoj ricevu la organon de BEA.

Ĉu vi, kara leganto, aliĝos al la abonkonkurado?

LA REDAKCIO

Gratulojn, samideano Aleksiev!

La 29-an de junio 1989 la elstara sociaganto kaj meritplena veterano esperantista **Nikola Bogdanov Aleksiev** 80-jariĝis. Pli ol 60 jarojn li aktivis en la Esperanto-movado: li estas honora prezidanto de MEM, honora membro de UEA kaj BEA. Pro lia sindona sociagado li estas distingita per la titolo „Heroo de Socialisma Laboro“, trifoje per la plej alta ordeno de nia patrujo „Georgi Dimitrov“ kaj aliaj ordenoj, interalie de Sovetunio kaj GDR. Li estas konstanta valora kunlaboranto de „Bulgara Esperantisto“. La Redakcio sincere gratulas lin okaze de lia 80-jariĝo kaj bondeziras al li longan kreaĵon agadon kaj personan feliĉon!



LETERO AL LA REDAKCIO

Estimata redakcio,

Dum antaŭnelonga vizito al la ĉefurbo de Kazaĥa SSR u. Alma-Ata mi estis impresita de renkontiĝo kun geknaboj — aktivuloj de muzeo „Georgi Dimitrov“ en mezlernejo N 16.

Mi alvenis tiun ĉi muzeon, kiu estas negranda kaj laika, fine de la lernejaj okupoj. En vasta, artiste ordigita salono, apud la surmuraj standoj kaj surtablitaj eksponaĵoj — revuoj kaj gazetoj, establiĝis granda grupo da vilaĝaj lernantoj veninta, kiel mi poste informiĝis, el tre malproksima parto de Alma-Ata-departemento.

La ĉiĉerono estis nigrhara knabo-kazaĥo, evidente lernanto de oka klaso. Min impresis lia sonora voĉo kaj emocia rakonto pri veterano de Bulgara Kompartio, heroo de socialisma laboro el PR Bulgario, ĵurnalisto kaj esperantisto Nikola Aleksiev.

Sur la muro videbliĝis granda foto de Aleksiev kaj sub vitro surtable liaj libroj („La ruĝa torĉo“ k. a.), en bulgara kaj en Esperanto. Tie troviĝis ankaŭ artikoloj liaj el

„Bulgara Esperantisto“ kaj numero de la vaste legata en Sovet-Unio populara revuo „Ogonjok“ kun artikolo titolita „Ni konatiĝu kun kamarado Aleksiev“.

„La partia staĝo de Aleksiev — klarigis al siaj aŭskultantoj la juna ĉiĉerono, manmontrante la foton de la bulgara komunisto — komenciĝis en 1930. Li organizis ricevadon el Sovet-Unio, inkluzive Kazaĥion, de korespondaĵoj el la vivo de sovetia popolo. Nikola Aleksiev kun aliaj revoluciaj bulgaraj ĵurnalistoj disvastigadis sub tre malfacilaj kondiĉoj tiujn interesajn por la bulgaraj laboruloj materialojn. Oni multfoje arestis kaj juĝis lin. En la malliberejoj de Bulgario li pasigis preskaŭ ok jarojn. Liberigis lin la aŭtoritatuloj nur kiam li estis ege malsana pro ftizo. Malgraŭ ĉio Aleksiev abnegacie realigadis la postulojn de la Kompartio: propagandi en la paĝoj de laŭlegaj kaj de malpermesitaj revoluciaj eldonaĵoj la veron pri Sovet-Unio, pri la unuaj kvinjarplanoj, pri la heroeca laboro de

la laboristoj kaj la kamparanoj de nia lando.

Ankaŭ nun — daŭrigis sian rakonton la elokventa lernanto — Nikola Aleksiev estas inter tiuj, kiuj konstruas socialisman Bulgaron. Li fordonas al la agado por plifirmigo de la amikeco inter niaj du landoj-fratoj siajn energion, grandegan sperton kaj riĉajn konojn...”

Fine la kazaĥa knabo el Alma-Ata tralegis liniojn el leteroj de Aleksiev, ricevitaĵ far aktivuloj de la lerneja muzeo „Georgi Dimitrov“, kies amiko estas „avo Nikola“.

Kun granda intereso, apenaŭ spirante, aŭskultis la rakonton pri „avo Nikola“ la geknaboj el vilaĝaj lernejoj de Kazaĥio.

Mi meditadis: mankas pli valora honorigo al la maljuna batalveterano de l'komunista movado ol tiu, ke lia aktivado en la batalo por triumfo de la ideoj de marksismo-leninismo priservas firmigon de la amikeco inter la frataj popoloj el socialisma

landaro, priservas la noblan Lenin-testamento por Kazaĥio, u. Karaganda
 aferon eduki la junajn „firmigo de la revoluciaj Via kazaĥa amiko,
 generaciojn en spirito de tradicioj en la sino de varma adepto de la amikeco
 internaciismo. Nome en tio l'popolo", la atenta rilato al inter Bulgario kaj USSR
 konsistas la realigo de tiuj tradicioj. I. Laz.

KELKAJ NEKOMBITAJ PENSOJ

● Efikas male nia propagando, ke aŭtoro de Esperanto estas okulkuracisto. Ĉe ne-esperantisto tuj aperas tute logika demando: „Ĉu kreo de internacia lingvo eniras la kompetentecon de okulkuracisto?”

● Ĉiam efikas pli konvinkige, kiam niaj propagandistoj klarigos al ne-esperantistoj, ke d-ro Zamenhof estis naturdotita kaj bone kvalifikita poligloto, konanta dekdu lingvojn — antikvajn kaj modernajn. De simila persono oni povus atendi seriozan projekton de internacia lingvo, ĉar li meritas konfidon pro sia eruditeco.

● Kiam oni diras en mia ĉeesto, ke Esperanto, kiel ĉiu artefarita, elpensita, arbitre farita lingvo ne povas posedi la kvalitojn de la gepatraj, naturaj, etnaj lingvoj, mi trankvile informas la diskutanton: ĉefa argumento kontraŭ via aserto estas la fakto, ke dum la pasinta pli ol unu jarcento parolis en tiu lingvo tra la tuta mondo dekmilionoj da esperantistoj samtiel, kiel ili parolas en siaj gepatraj lingvoj. Pliaj argumentoj ĉu necesas?

● Esperanto akiras rekonitan aŭtoritaton kaj popularecon se la esperantistoj kunlaboras kun ceteraj ne-esperantistaj organizaĵoj kaj movadoj, eĉ kun apartaj famaj personoj, kiuj havas proksimajn ideojn en sia platformo. Ekzemple: strebo al internacia kompreniĝo pri disputproblemoj per uzado de pacaj rimedoj, sed ne per perfortaj metodoj de timigo, ĉikanado, ultimatoj aŭ simple per militado.

● Mondpaca esperantista movado (MEM) agadas laŭ tiu principo: pli bone unu jaro de diskutado ol unu tago de militado.

● En la nuna mondo ĉiu aparta intereso devas esti subigita al la plej ĉefa intereso de la tuta homaro: estingo de ĉiu militfajrujo, loka armita konflikto, solvado de la problemoj inter ŝtatoj surbaze de pacaj traktadoj kaj alprenado de kompromisaj pozicioj egale kontentigaj por la disputantaj partioj, strebo al ekvilibro de la intereso, sen altrudo aŭ ruzo.

● La esperantistoj povus perfekte kontribui al kreo de mondo de interkompreniĝo, amikeco inter la popoloj, reciproka bilanco de l'intereso.

● Absoluta neŭtraleco en la Esperanto-movado estas absolute abstrakta ideo, nerealegebla en la praktiko de l'homaro. Oni povas defendi pozicion pri neŭtraleco rilate religion, partian programon, filozofion k. s. Sed en la praktika vivo la politiko ĉeestas eĉ tiam, kiam oni ne supozas ĝin — tiel perfekte ĝi (la politiko) eniras niajn estaĵojn kaj ni ne rezonas pri ĝi, samkiel ni al kutimiĝis al la aero, kaj ni ne rezonadas ĉu spiri ĝin aŭ ne.

● Kiu homo ne estas interesata pri la problemoj: paco aŭ milito? Sed la paco ne venas

aŭtomate, por ĝi oni devas aktivadi en diversaj formoj. Do, ĉu la esperantistoj devus atendi, ke iu alia ekster la esperanto-movado, devas garanti la pacon? Sed se ĉiuj organizaĵoj pretekste, ke ili ne okupiĝas pri politiko, faros la samon, la manoj de la militistaj rondoj estos liberigitaj kaj ili trankvile povus prepari militojn.

● Pri paco kaj milito ne povas ekzisti neŭtraleco. Tamen porpaca strebado kontraŭas al militpreparado. Pacistoj kaj militistoj prezentas du absolute kontrastajn tendencojn. Kaj la kontraŭbatalo por venko de la paco aŭ de la milito prezentas faktan politikan batalon, eĉ kiam oni ne konceptas tion. La reala vivo estas pli forta ol ĉiu superstiĉo. Ĉu ne estas preferinde konscii tion, ol agadi blinde?

● Kiam esperantista medio aŭ presaĵaro oni sopiras pri la „fina venko” de Esperanto mi demandas min: „Sed ĉu Esperanto jam ne venkis siajn rivalojn, ĉu ĝi ne ĝuas simpatiojn (eĉ se portempe nudajn, tamen publikajn) de internacie rekonitaj instancoj? Se tamen temas pri oficialigo de Esperanto en la interŝtataj aŭ internaciaj kontaktoj, ni mem devas ankoraŭ longe kaj insiste labori por pruvi la utilon de similaj kontaktoj realigitaj per la Internacia Lingvo. Do, la esperantistaro je la unua linio! Neniu anstataŭ ni plenumos tiun gravan laboron.

● La slogano „Unu homaro — unu lingvo” estas en sia kerno neĝusta el scienca vidpunkto. Pasos jarcentoj ĝis kiam oni iniciatos trakti el teoria kaj praktika vidpunkto similan sloganon. En nia kaj sekvaj epokoj tiu slogano povas ludi nur negativan rolon, oponante la ekzisto-rajton de naciaj lingvoj.


● Same la slogano „Esperanto — dua lingvo por ĉiu” estas nereala. Oni amase lernas fremdajn lingvojn preferante ilin pro praktikaj konsideroj. Ĉu Esperanto povus anstataŭigi la fremdajn lingvojn en ties vasta praktika spektro? Ni vane propagandos similan aserton per vortoj, sed ne per faktoj.

● En la nuna pragmatisma vivo nia poresperanta agitado kaj propagando estas ege malfacilaj. Ĉiam oni demandas nin: „Kion mi profitos el la kono de Esperanto por nia praktika vivo?”

● Ni povas havi pli bonan varbrezulton, se ni konsideros la eblajn praktikajn bezonojn de la homoj kaj krom tio ni devas varbi por Esperanto ankaŭ personojn kun certaj idealismaj streboj: paco, interkompreniĝo, amikeco inter la popoloj, konatigo de nialandaj valoraĵoj al internacia publiko, varbado de amikoj al nia popolo en eksterlando k. s.

Nikola ALEKSIEV

Ĉepelare bonvenigas vin!



Se vi vojaĝas al fama Internacia Esperanto-Kursejo en la pitoreska Rodopi-montaro, via vojo nepre alkondukos vin en urbeton Ĉepelare. Kaŝita inter la ĉiam verdaj faldoj de Meza Rodopi-montaro, ĝi estas konata ne nur pro siaj ĉarmaj ĉirkaŭaĵoj, sporta mezlernejo kaj uzino por produktado de bonkvalitaj skioj, sed ankaŭ pro sufiĉe forta kaj multnombra Esperanto-societo. En la urbeto la vorto „Esperanto” estas populara de multaj jaroj. Ĝin ripetas lernantoj kaj 70—80 jaraj barbuloj, ŝafistoj en la montaro kaj infanoj... Vi ne hezitu, vizutu Ĉepelare...

... Kompreneble via promonado komenciĝos de la ĉefstrato. Vi estas esperantisto kaj vin nepre impresos la verdaj vitrinoj kun skribaĵoj pri kaj en Esperanto, troviĝantaj en la urba centro. Poste viaj okuloj trarigardos la najbaran domon kun

fenestro-simbolo: granda vitra-verda kvinpinta stelo kun majusklo „E”. En tiu momento vi malkovros por vi la klubejon de E-societo „Diĉo Petrov”. Ĝia historio estas multjara, riĉenhava kaj interesa...

Ĝi komenciĝas ekde 1926... Venis el Plovdiv



Dimităr Marev

junulo, nomata Dimităr Marev. Li ankoraŭ en siaj lernejanaj jaroj konatiĝis kun



Sceno el la dramo "Kiam tondro trafas..." Ludas Amatora E-Teatro.

la Internacia Lingvo kaj en la urbeto li faris fraŭlinon Nadejda ne nur sia edzino, sed ankaŭ samideanino. Instruisto laŭ profesio, Dimitâr Marev komencis ankaŭ instrui Esperanton kaj baldaŭ li fondis lokan esperantistan societon. Tio ne surprizigis multe la loĝantojn, ĉar la tiama vilaĝo Ĉepelare estis sufiĉe vigla centro en tiu parto de Bulgario, kiu antaŭnelonge estiĝis libera depost kvincent jaroj de nigra osmana jugo. Du jarojn post la liberiĝo — en 1880 ĉi tie ekestas legejo (malgranda kulturdomo). En 1895 fondiĝas la unua en la Rodopi-regiono teatra ensemblo, de kiu devenas la hodiaŭa profesia teatro en urbo Smoljan. Per la laboro de la loĝantaro en 1923 estis konstruita la unua en nia lando vilaĝa elektrocentralo.

En 1962 Ĉepelare estiĝas urbo kaj hodiaŭ ĝi estas la plej alte situanta urbo sur Balkana Duoninsulo — je alteco 1150 m super la marnivelo.

Dimitâr Marev, krom instruisto, plurajn jarojn estis legeja sekretario kaj prezidanto kaj konstante kunigis la esperantistajn iniciatojn kun la agado de la legejo. Bedaŭrinde en 1934 la faŝisma reĝimo ĉesigis la aktivadon de la esperantistoj en Ĉepelare. Post la Naŭa de septembro 1944 ili restarigis sian societon kaj donis al ĝi la nomon de la pereinta rodopa kontraŭfaŝisto-esperantisto Diĉo Petrov.

Sub la gvido de sia prezidanto, disponiginta parton de sia propra domo por E-klubejo, la societo kreskis kaj prosperis. Oni organizis entreprenon por produktado de memoraĵoj, plastaĵoj kaj ĉiutagaj varoj. Tiamaniere estis havigita mono por financado de la esperantista agado. Kaj jen la realaj rezultoj:

● *El la 5000 loĝantoj 168 personoj nun estas membroj de la E-societo. Ekzistas ankaŭ lernejana E-klubo kun 27 anoj. Ĉi-jare en la urbo funkcias du kursoj: civitana — kun 17 kursanoj, kaj lernejana — kun 21 personoj.*

● *Dum la tempo de Dimitâr Marev, kiu forpasis pasintjare, estis kriza Junulara Ensemblo pri E-Parolo kaj Kanto. Dum pli ol dek jaroj ĝi, sub la gvido de Nikolina Takova — vicprezidanto de la societo, gajnas premiojn ĉe la tradiciaj enlandaj Revuoj de E-Parolo kaj Kanto kaj ĉe Konkursoj-Recitaloj*

de Boteva kaj Revolucia Poezio. Ekde la fondiĝo de tiu ensemblo komenciĝas ankaŭ ĉiujaraj partoprenoj de reprezentanta esperantista grupo en urba solenaĵo okaze de la 24-a de majo — Tago de la Slava Alfabeto kaj Bulgara Kulturo. Tiam marŝas verdvestitaj gejunuloj, portantaj la esperantistan standardon, esperantlingvajn sloganojn, kolombojn kun verdaj rubandoj. La junaj esperantistoj tradicie prezentas surstrate belan gimnastikan programon.

● *Dank' al la vigla korespondado oni kreis amikajn ligojn kun samideanoj en la tuta mondo. Pli ol 80% de la societaj membroj korespondas kun esperantistoj el pli ol du landoj. La societo havas jam 24 tabulojn kun eksterlandaj poŝtkartoj, poŝtmarkoj kaj kovertoj. Estas regulaj la reciprokaj gastadoj kun gesamideanoj el Hungario (urbo Kiskunfélegyháza) kaj Pollando (Szelecin).*

● *Dank' al la bonaj kontaktoj kun la lokaj reprezentantoj de la diversaj publikaj organizaĵoj la esperantistoj ricevas helpon rilate ĉiun sian iniciaton. Ekzemple ĉe la legejo oni organizis esperantistan Kantensemblon pri Originala Rodopa Folkloro kaj esperantistan Amatoran Teatron. Lige kun la 110-jariĝo de la granda bulgara poeto Pejo Javorov ĝi prezentis pasintjare en bulgara lingvo lian dramon „Kiam tondro trafas..." kaj ĉi-monate an-*

taŭstaras ĝia esperantlingva prezento.

La historion de E-societo „Diĉo Petrov” mi eksciis de ĝia nuna prezidanto Petăr Panov. Fine de nia konversacio li rakontis pri jubilea solenaĵo en 1986, kiam la societo festis sian 60-jariĝon. Venis gastoj el la tuta lando, en la salono ĉeestis 700 personoj. Tiam la societo estis distingita per ordeno „Kiril i Metodij” — II grado kaj per Diploma de la CE de BEA.

Se via vojo alkondukos vin en Ĉepelare, ne forgesu malfermi la pordon de la loka E-societo. Ĉiuvespere tie deĵoras esperantisto. Se

vi troviĝos en la urbeto marde, vi estos en vera E-medio, ĉar la mardajn vesperojn funkcias Rondo Parolanta. Eble tiam vi konatiĝos ankaŭ kun plej elstaraj lokaj geesperantistoj: Nadeŝda Mareva (la edzino de Dimităr Marev), Dafinka Ĉerneva (membro de la societo ekde 1948), Nadka Daskalova (respondeculino pri la junulara agado), Radka Savova (societa membro ekde 1960), d-ro Todor Marinov (estranaro), Erma Taleva (respondeculino pri eksteraj rilatoj), Nedjalka Spilkova (respondeculino pri la ligoj kun la lokaj publikaj organizaĵoj). Eble vi ankaŭ vizitos la Domon de la

Speleologo — unikan muzeon pri esplorado de la rodopa karsto. Ĉi tie oni okupiĝas ankaŭ pri arkeologio kaj paleontologio. En la domo vin gastigos la esperantisto-speleologo Dimităr Rajĉev.

Pasintjare gastoj de Ĉepelare kaj ĝiaj esperantistoj estis junaj afrikanoj, kiuj laŭ propono de UEA kaj invito de BEA lernis Esperanton en IEK-Pisanica. La urbeton venis gesamideanoj el Ĉeĥoslovakio, GDR, Francio...

Post tiu „promenado” tra Ĉepelare, ĉu ankaŭ vi mem dezirus esti ĝia gastulo...?

Maria JANKOVA



Ensemblo pri Originala Rodopa Folkloro

PROFUNDAJ RADIKOJ DE LA AMIKECO INTER BULGARAJ KAJ RUMANAJ ESPERANTISTOJ



Jam ĉe la unuaj paŝoj de la organizitaj bulgara kaj rumana E-movadoj sur ambaŭ bordoj de Danubo komenciĝis viglaj amikaj rilatoj. Amasaj e-istaj grupoj reciproke vizitis la unuajn E-kongresojn en Bulgario kaj Rumanio.

La III kongreso de la bulgaraj e-istoj en Ruse (1909 j.) estis vizitata de grupo da rumana e-istoj. Ili invitis la bulgarojn al Bukareŝto. La duan tagon la bulgaraj e-istoj amase veturis kun siaj rumana amikoj al Bukareŝto, kie la kongreslaboro daŭris. Aliĝis ankaŭ 11 serbaj e-istoj el Beogrado. La kongreso ricevis internacian karakteron kaj estis nomita Unua Kongreso de la Apuddanubaj Landoj. Ĝi havis fortan influon sur ĉiujn partoprenantojn. Komenciĝis rapida supreniro de la E-movadoj en Bulgario kaj Rumanio.

La IV kongreso de la bulgaraj e-istoj interkonsente kun la rumana e-istoj decidis, ke la organo de la Bulgara E-Ligo „Lumo” kuniĝu kun la gazeto „Rumana Esperantisto”. Tiel naskiĝis gazeto

„Danubo” — komuna organo de la bulgaraj kaj rumana e-istoj. Ĝi estis eldonata en Bukureŝto nur en E-to sub la gvido de d-ro Gabriel Robin. Redakcia sekretario estiĝis Nikifor Ĥristoskov, kiu tiucele ekloĝis en Bukureŝto, pagate de la Rumana E-Societo. Li posedis perfekte E-ton, havis bonan stilon kaj aperigis multajn artikolojn en la E-gazetaro. La redakta komitato konsistis el tri rumana kaj tri bulgara e-istoj. „Danubo” estis bonega E-gazeto, kiu aperadis preskaŭ du jarojn. Post la subita morto de d-ro Robin kaj antaŭ la proksimiĝanta periodo de militoj ĝi ne plu povis ekzisti.

„Danubo” lasis helan spuron en la rilatoj de la bulgaraj kaj rumana e-istoj.

En sia n-ro 11—12 de 1911 j. „Danubo” donas 8-paĝan korespondanĵon sub titolo „Ekskurso de la rumana e-istoj al Pleven, Sofia, Târnovo” (5—20.VIII.1911). Laŭ invito de la Bulgara Esperantista Ligo la rumana grupo, ĉ. 80 personoj, veturis al Sofio por partopreni la kvinan kongreson de la bulgaraj e-istoj. Survoje la grupo vizitis Pleven kaj la sanktan por ĉiu rumano vilaĝon Grivica, kie en 1877 okazis la plej grandaj bataloj inter la turkoj kaj la rumanoj, partoprenantaj la Rusa-Turkan Militon per 60 000 soldatoj kiel aliancanoj de Rusio. Ĉe la Sofia Stacidomo la rumana grupo estis renkontita de multege da sofiaj e-istoj kaj la militista muziko, kiu ludis „La Espero’n”.

*Jordan KALINOV
(El „Bulgara Esperantisto”, n-ro 1/1978)*

KIAM MI ESTIS ĈEFREDAKTORO...

REALISMA ENHAVO KAJ AKTUALA TEMARO



Ĉefredaktoro de la asocia organo „Bulgara Esperantisto” mi fariĝis post la 37-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj, kiu okazis en Varna la 20-an de majo 1968. La duobla n-ro 7—8 jam aperis sub mia redakto.

La redaktadon mi akceptis de la maljuna E-aganto kaj veterano Ivan Sarafov, kiu tiutempe estis sekretario de BEA pri la instruaj kaj kulturaj demandoj. Malĝojiga evento tamen subite urĝigis la aferon: en aŭgusto samjare Sarafov grave malsaniĝis kaj eniris hospitalon. Li eĉ ne sukcesis transdoni al mi la ŝlosilojn de sia skribotablo, sur kiun mi devis eksidi kaj daŭrigi la laboron. Tiel tute neatendite la tuta laboro falis nur sur min. Kaj — por duobla numero! Mi ne ektimis pri la enhavo — ja kelkajare mi estis membro de la Redakta Komitato. Sed timigis min la teknika aranĝo. Tamen vole-nevole mi devis fari ĉion sola. Pli kompetenta ĉirkaŭ mi ne estis. Ricevinte la unuajn presprovaĵojn mi faris mian unuan projekton pri paĝaranĝo. Kaj iom premita mi iris en la hospitalon, por ekscii la opinion de Ivan Sarafov. Li trarigardis ĉion kaj diris: „La paĝaranĝo estas bona. Mi ne havas rimarkojn.”

Kaj la laboro ekmarŝis. Nature, mi havis la helpon de Redakta Komitato, kun kiu ni planis la materialojn, serĉis konvenajn aŭtorojn kaj tradukistojn, pridiskutis plej gravajn demandojn. La korektado estis farata sinsekve de Vasja Cvetkova, Minko Conkovski, Rajna Konstantinova (la lastaj du jam forpasintoj).

Samtempe mi estis membro de la asocia Buroo, ankaŭ gvidanto de la fakultativa instruado de Esperanto en la Sofia Ŝtata Universitato „Kliment Ohridski”. En la sama tempo mi laboris kiel salajrata redaktoro en Libroeldonejo „Oteĉestven Front”.

Laŭ ĉiuj ĉi kaj aliaj linioj ĉiutage impetis al mi amaso da taskoj, grandaj kaj malgrandaj, tamen ĉiam temporabaj. Tial mi estis devigata labori konstante ĝis

postmeznokto kaj komenci frumatene. Vespere mia familio ekdormadis kaj la tuta kvartalo dronis en dormo — mi tamen laboris. Matene la familio same dormis kaj la tuta kvartalo ankaŭ — mi devis esti vigla ĉe la skribotablo. Post 7-jara tia labor- kaj vivmaniero mi eksentis, ke plu mi ne povas elteni, des pli ke ankaŭ somere mi neniam ripozis: ĝuste en tiu periodo ni komencis organizi la Somerajn Internaciajn E-Kursojn ĉe Nigra Maro, apud Burgas, kaj tie ĉiam mi estis kaj instruanto, kaj rektoro. Tiam mi faris proponon al la Buroo: mi pretas rezigni pri ĉiu alia laboro, se mi havus eblecon dediĉi min nur al E-laboro, ĉar Esperanton mi plej ŝatas kaj amas. La demando estis tuj solvita kaj la 1-an de marto 1975 mi estis enoficigita kiel salajrata ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto”. Krom tio la Buroo tamen komisiis al mi plenumi ankaŭ la funkciojn de sekretario pri instruado. Ambaŭ laboroj — la instruado kaj la redaktado — al mi ege plaĉis kaj mi akceptis. Kompreneble, la ŝarĝo mia ne malkreskis, tamen nun jam mi havis ĉion kolektitan samloke. Tio daŭris ĝis 1980, kiam la 40-a jubilea Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj en Plovdiv elektis min ĉefsekretario de BEA.

Do — tiel: preskaŭ 13 jarojn mi estis ĉefredaktoro de nia kara „Bulgara Esperantisto”! Neniu antaŭ mi estis tiom longe ĉefredaktoro de nia asocia organo. Ŝajnas al mi, ke ne estus malmodeste fieri pri tio.

Nun mi dezirus dividi kun la nuntempaj legantoj de „Bulgara Esperantisto” iujn pli interesajn kaj gravajn momentojn el ĝia vivo dum tiuj 13 jaroj.

Ekde la komenco jam al ni estis klare, ke plej ĝusta vojo estas tiu — daŭrigi kaj riĉigi la bonajn tradiciojn, kiujn postlasis la antaŭuloj. En ĉiu numero ni strebis proporcie aperigi artikolojn — frontajn, problemajn, lingvajn, primovadajn, artikolojn pri aktualaj sociaj kaj naciaj demandoj, materialojn pri la organiza vivo de nia asocio ktp. Kompreneble, ni tuŝis demandojn kaj eventojn ankaŭ el la vivo de la internacia E-movado. Regule ni subtenis la rubrikon „Juna Esperantisto”. Ni enkondukis regulan rubrikon „Heroa Pasinteco” — pri la partopreno de bulgaraj esperantistoj en la kontraŭfaŝisma batalo. Lige kun la 30-jariĝo de nia socialisma revolucio (je la 9.IX.1944) ni publikigis liston de 113 pereintaj en la batalo gesamideanoj, pri kiuj la asocio havis ĝustajn informojn kaj alvokis la E-societojn kaj la esperantistojn daŭre serĉadi informojn pri pereintoj kaj informi nin, por ke la nomaro fariĝu maksimume plena. Mi opinias, ke la nombro de pereintaj esperantistoj-antifaŝistoj en nia lando proporcie al la loĝantaro antaŭ la Dua Mondmilito (iom pli ol 8 milionojn) estas plej alta en la mondo. Pri tio la bulgara E-movado rajtas fieri. Sur la paĝoj de la revuo ofte aperis „Libera Tribuno”, kio kontribuis al aktivigo de la legantaro kaj la tutan asocian membraron.

La bezono pri literaturaj verkoj en Esperanto estis kaj restas ĉiam granda. Unuflanke ili ludas gravan rolon por eduki bonajn esperantistojn kaj civitanojn, aliflanke — ilin oni uzas en la amaskultura agado esperantista, trie — aperigante similajn verkojn la revuo helpas la gravan proceson de evoluigo de novaj

literaturaj talentuloj — aŭtoroj kaj tradukistoj. Konsciante tion la Redakcio zorgeme klopodis aperigi en ĉiu numero literaturajn verkojn — poezion kaj prozon, originalan kaj tradukan. Dum la lastaj jaroj ni transiris al la jena praktiko: la duonon de la duobla somera numero de la revuo ni dediĉis nur al literaturaj verkoj. Por la malgrandaj legantoj ni komencis la rubrikon „Verdaj Steletoj”, kiu vere estis maksimume ekspluatata far la lernantaro. En la rubriko „Distroj” ni regule aperigis humuraĵojn, vortenigmojn, spritaĵojn. Por konigi al la eksterlandaj legantoj belajn angulojn el nia lando kaj tiel veki ilian intereson viziti ĝin, ni komencis aperigi la rubrikon „Ĉarma lando”, ĉiam kun foto.

De tempo al tempo ni publikigis intervjuojn de elstaraj sociagantoj kaj gvidantoj, de eksterlandaj gastoj-esperantistoj.

Sciante, ke la lingvaj demandoj aparte interesas la esperantistojn — kaj novajn, kaj progresintajn, kaj perfektajn — ni regule subtenis la rubrikon „Por via lingva perfektigo” kaj „Lingvaj demandoj”. Iom poste ni enkondukis ankaŭ la rubrikon „Lingva laboratorio”, en kiu ni proponadis por interpreto kaj traduko malfacilajn kaj maloftajn vortojn kaj esprimojn, frazeologiojn. Tiu ĉi rubriko estis, kompreneble, unualoke por la plej bonaj esperantistoj, por tiuj, kiuj rompadis siajn kapojn super tradukoj. Sed fakte ĝi interesis ĉiujn kaj utilis al ĉiuj.

Grandan zorgon al la redakta komitato kaŭzis la eldonkvanto. Kiam en 1968 mi akceptis ĝin, la permesita eldonkvanto estis 4000. Sed, bedaŭrinde, ĝi ne estis atingita. La realaj abonantoj estis ĉ. 3400. Ni starigis antaŭ ni la taskon grandigi la eldonkvanton. Tiucele ni komencis ĉiujare doni kontrolciferojn al la E-societoj, anoncanta konkursadon en la oficiala abonkampanjo. La kontrolciferoj estis proporciaj al la membraro de la apartaj societoj. Samtempe ni

enkondukis rubrikon „Verdan Tabulon” (honor-tabulon), en kiu ni publikigis la atingojn de la plej bonaj disvastigantoj de la revuo. Tiutempe ni vaste malfermis la paĝojn de „Bulgara Esperantisto” por materialoj el la vivo de la sovetiaj esperantistoj, kiuj havis periodaĵon nek en, nek pri Esperanto. Tio kontribuis ne nur al proksimiĝo inter la esperantistoj el ambaŭ landoj, sed ankaŭ estis reala helpo al la Esperanto-movado en Sovetunio.

En la personeco de Johannes Palu el Talinn ni trovis la plej fervoran disvastiganton de „Bulgara Esperantisto” en USSR. Rezulte de tio nur el Sovet-Unio ni ekhavis 1000 abonantojn. Perantojn de la revuo ni trovis ankaŭ en aliaj landoj. Tiel dank’ al la prenitaj rimedoj la eldonkvanto de nia organo superis 6000 ekzemplerojn.

Ĝenis nin nur la malbona kvalito de la papero, sur kiu estis presata la revuo. Tial en la interna korpo la ilustraĵoj iufoje estis preskaŭ nekompreneblaj. Tio igis nin fari la jenon: doni la fotojn sur la dua kaj tria kovrilpaĝoj, por la interna korpo restis nur la desegnaĵoj.

Mi opinias, ke ni transdonis la redaktadon de nia organo, ĉe bonaj pozicioj, ekde 1981 al Donĉo Ĥitrov.

„Bulgara Esperantisto” estis ĉiam progresema, demokratia. La revuo kontribuis al altigo de la esperantista konscio de siaj legantoj, al disfloro de nia nacia kulturo; ĝi honeste batalis por paco. Ĝia enhavo estis ĉiam realisma, la temaro — aktuala. La revuo tuŝis ĉiujn vivgravajn problemojn de la E-movado. Ties lingvaĵo kaj stilo estis ĉiam klaraj, kompreneblaj, alireblaj por ĉiuj legantoj — ili estis Zamenhofaj. Mi opinias, ke dum la citita periodo „Bulgara Esperantisto” donis valoran kontribuon al la progreso de la bulgara E-movado.

Kunĉo VĀLEV

UTILA VIZITO

La gastadoj de la redakcia teamo de „BE” ĉe E-societoj evidentiĝis utila kaj fruktodona praktiko. Tiuj renkontiĝoj-dialogoj kun legantoj estiĝis ne nur horoj de bilanco de nia laboro, sed ankaŭ rimedo por precizigo de nia laborstilo cele al kontentigo de la legantaj deziroj kaj intereso. Tiumaniere firmiĝas la ligoj legantoj — Redakcio, ni interkonatiĝas pli bone kaj la rezultoj estas reciproke kuraĝigaj kaj profitaj.

La 21-an kaj la 22-an de aprilo k. j. ni gastis ĉe E-societo „Stoju Kalpazanov” en Velingrad — dommastro de la Festo de „Bulgara Esperantisto” ĉi-septembre enkadre de la loka E-aranĝo „Tra arbaroj kaj kamparoj”. En kunveno de la societo ties prezidanto inĝ. Boris Gaĝanov prezentis la gastojn kaj donis la parolon al Maria Jankova, ĉefredaktorino de la Unuigita Redakcio de BEA. Ŝi tuŝis la atingojn kaj problemojn de „BE”, „Panorama Esperanto” kaj de neperiodaj E-eldonaĵoj.

La ĉeestantaj membroj subtenis la novan eksteran aspekton de „BE” kaj aprobis la riĉan kaj interesan enhavon de la revuo. Pozitivajn opiniojn esprimis inĝ. Boris Gaĝanov, Boris Marinov, Aksinija Topalova, Dimităr Ĵdrakov k. a. M. Jankova funde respondis al la starigitaj demandoj, kaj aparte pri la manko de vortaroj kaj bonkvalitaj lernolibroj. Ŝi prezentis koncize ankaŭ la programon de la Festo de „BE” en septembro: solena kunveno, pridiskuto de la temo „La Esperanta ĵurnalismo — faktoro de nia movado”, renkontiĝo kun legantoj kaj kunlaborantoj de nia revuo, vetkurado por la premio de „BE” kaj partopreno en la programoj de la aranĝo „Tra arbaroj kaj kamparoj”.

Lige kun la Festo de „BE” okazis labor-renkontiĝo de la redakcia teamo kun komunumaj sociagantoj Zavarin Marov kaj Georgi Velev. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de la loka E-societo inĝ. Boris Gaĝanov

kaj reprezentanto de loka ĵurnalo „Ĉepinec” Angel Paĉalov. Estis esprimita interesiĝo pri la Festo de „BE” kaj promesita ĉiuflanka subteno fare de la sociaj instancoj de la urbo.

La sekvan tagon Manol Ĉolev, multjara eksprezidanto de E-societo „Stoju Kalpazanov”, gvidis nin en la bela ĉirkaŭaĵo de Velingrad kaj konis al ni famajn naturlokojn. Liaj rakontoj pri la historio de la E-movado kaptis nian atenton kaj estigis veraj kaj agrablaj por ni — ankoraŭ junuloj en la esperantista medio.

Ni elkore dankas al la dommastroj pro la gastamo, kaj speciale al inĝ. - Boris Gaĝanov, Elena Janĉeva, Manol Ĉolev kaj Boris Marinov. Ni kredas, ke similaj estontaj renkontiĝoj firmigos niajn kontaktojn kun la legantoj, kio certe servos al pli efika kunlaboro kaj reciproka kompreniĝo.

Evĝeni GEORGIEV

KATALOGO DE E-ELDONAĴOJ

LERNOLIBROJ

LERNOLIBRO DE ESPERANTO POR UNUA LERNOJARO, Jordan Markov, Kunĉo Válev kaj Ivan Sarafov. Sofio: Narodna Prosveta, 1982 (dua eldono). 192 p. 21 × 15 cm. Prezo: 0.95 lv./6.60 gld.

Riĉe ilustrita. Precipe taŭga por lernejanaj kursoj. Kun klarigaj notoj en bulgara lingvo, bulgara-Esperanta kaj Esperanta-bulgara vortaretoj.

NI LERNU PLU! — **KURSO DE ESPERANTO (DUA GRADO)**, Violin Oljanov. Sofio: BEA, 1976. 138 p. 22 × 16 cm. Prezo: 1.40 lv./5.40 gld.

Progresiga lernolibro en 25 lecionoj. Taŭga por kursa, koresponda kaj aŭtodidakta studado de Esperanto. Ĉiuj taskoj kaj klarigaj notoj estas en Esperanto. Enhavas bulgaran-Esperantan kaj Esperantan-bulgaran vortaretojn.

AL PERFEKTIĜO! — **SUPERA KURSO DE ESPERANTO (TRIA GRADO)**, Violin Oljanov. Sofio: BEA, 1976. 104 p. 21 × 15 cm. Prezo: 0.85 lv./6.60 gld.

13-leciona lernolibro por kursoj kaj memstudado. Tute en Esperanto. Kun 28-paĝa skizo pri la sintakso en Esperanto. Daŭrigo de „Ni lernu plu!“ de la sama aŭtoro.

INSTRUHELPILOJ

ALBUMO — 66 **BILDOJ**, Neno Janev. Sofio: BEA. Formato A4. Prezo: 1.47 lv./9.00 gld.

Desegnaĵoj, kiuj ilustras tiklajn momentojn en la gramatiko de Esperanto. Utila por E-instruantoj en elementaj kursoj. Amuza ne nur por infanoj.

DIDAKTIKAJ LINGVAJ LUDOJ, Aleksandr Fjodorov. Sofio: BEA, 1985, 94 p. 21 × 16 cm. Prezo: 0.75 lv./9.80 gld.

Kolekto de lingvaj ludoj, kiuj amuzigas, variigas la instruadon, paroligas la „eternajn komencantojn“ kaj evoluigas la parolkapablojn de progresintoj. Ege valora helpilo — ne nur por E-instruantoj!

EKZERCARO POR ELEMENTA KURSO DE ESPERANTO, Neno Janev. Sofio: BEA, 1985. 112 p. 21 × 15 cm. Prezo: 0.65 lv./6.00 gld.

Riĉe ilustritaj gramatikaj klarigoj por ekzercado kaj evoluigado de lingvaj kapabloj.

POSTKURSAJ LEGAĴOJ, Violin Oljanov kaj Neno Janev. Sofio: BEA, 1985. 146 p. 22 × 16 cm. Prezo: 0.55 lv./9.00 gld.

La legolibro konsistas el originalaj kaj tradukitaj verkoj: anekdotoj, fabeloj, humuraĵoj, rakontoj, versaĵoj k. a. La legaĵoj estas ordigitaj laŭ la facileco de ties lingvaĵo. Tiu libro certe variigos la kursan kaj eksterkursan lernadon de Esperanto.

PROGRAMOJ KAJ REGULAROJ, Sofio: BEA. Prezo: 0.65 lv./3.00 gld.

Nepre konsultenda por bulgaraj E-instruantoj kaj organizantoj de kursoj. Enhavas informojn pri la sistemo de E-instruado en Bulgario.

VORTAROJ

BULGARA-ESPERANTA VORTARO, Asen Grigorov. Sofio: BEA. 208 p. Poŝformato 14 × 10 cm. Prezo: 0.70 lv./5.90 gld.

Plurfoje reeldonita. Tre bona por komencantoj kaj progresintoj.

ESPERANTA-BULGARA VORTARO, Asen Grigorov. Sofio: BEA. 160 p. Poŝformato 13 × 10 cm. Prezo: 0.60 lv./4.90 gld.

Plurfoje reeldonita. Tre bona por komencantoj kaj progresintoj.

ORIGINALAJ VERKOJ

BELETRAJ ESEJOJ, Georgi Miĥalkov. Sofio: BEA, 1987. 114 p. 20 × 14 cm. Prezo: 0.45 lv./4.80 gld.

Dek eseoj pri la originala E-literaturo. Temas pri elstaraj E-verkistoj kiel William Auld, Hilda Drezen, Kalman Kalocsay, Eli Urbanova k. a.

MISTERA LUMO, Julian Modest. Budapeŝto: BEA, 1987. 92 p. 21 × 16 cm. Prezo: 2.70 lv.

Lirikaj noveloj, verkitaj en facila, tamen nuancoriĉa lingvaĵo.

ROZO KAJ GLAVO, antologio. Sofio: Sofia Press, 1987. 338 p. 22 × 16 cm. Prezo: 2.05 lv./18.00 gld.

Enhavas verkojn de pli ol 60 bulgaraj E-poetoj el la periodo 1906—1986 j.

VAGANTE TRA LA MONDO MALTRANKVILA, Nadija Adrianova. Budapeŝto: HEA, 1987. 106 p. 21 × 15 cm. Prezo: 3.90 lv.

Lirika biografio de ukraina esperantistino. La poemaro pritraktas la internacian amikecon kaj la pacsopiron de la homoj.

TRADUKOJ EL LA BULGARA

AMO MIA, Ĥristo Radevski. Trad. Venelin Mitev. Sofio: Sofia Press, 1988. 108 p. 22 × 16 cm. Prezo: 0.80 lv./5.10 gld.

Elektitaj versaĵoj de konata nuntempa poeto pri diversaj temoj.

APOSTOLO DE LIBERECO — PORTRETO DE VASIL LEVSKI SUR LA FONDO DE BULGARIO DE LA 19-A JARCENTO, Mercia Mac Dermott. Trad. Nikola Aleksiev. Sofio: Sofia Press, 1980. 520 p. 21 × 15 cm. Bindita. Ilustrita. Prezo: 4.26 lv./17.40 gld.

Biografia romano pri fama revoluciulo el la epoko de la Bulgara Renesanco.

BULGARA NUNTEMPA POEZIO KAJ PROZO, antologio. Kompilis Ĥristo Gorov. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press, 1985. 236 p. 22 × 16 cm. Prezo: 1.75 lv./15.00 gld.

Bunta panoramo de la nuntempa bulgara literaturo. La antologio enhavas verkojn de 53 poetoj kaj 11 prozistoj.

DE BORDO AL BORDO, Elisaveta Bagrjana. Kunmetis Venelin Mitev. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press, 1988. 100 p. 23 × 15 cm. Prezo: 0.82 lv./9.00 gld.

Inspira, fajra poemaro de nuntempa bulgara poetino.

ELEKTITA VERKARO, Ĥristo Botev. Trad. Ivan Dobrev kaj Ivan Sarafov. Sofio: Sofia Press, 1986. 84 p. 19 × 12 cm. Prezo: 0.65 lv./3.90 gld.

Elektitaj poemoj kaj prozaĵoj de unu el la plej grandaj bulgaraj poetoj. Kun klarigaj notoj.

GLACIKOVITA PONTO, LA, Ljuben Stanev. Trad. Asen Grigorov. Sofio: Sofia Press, 1984. 146 p. 20 × 13 cm. 1.10 lv./6.30 gld.

Romano pri Georgi Dimitrov en nazia malliberejo.

KANTOJ DE MOTOROJ, Nikola Vapcarov. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press, 1987. 120 p. 22 × 16 cm. Prezo: 1.00 lv./7.50 gld.

Romantikaj socikonsciaj versaĵoj de fama bulgara poeto. Kun enkonduka eseo de Ĥristo Radevski.

RAKONTOJ, Jordan Jovkov. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press, 1986. 284 p. 20 × 12 cm. Prezo: 1.80 lv./9.90 gld.

30 rakontoj de verkisto-humanisto, simplaj kaj stile brilaj.

RUZA PETRO, Sava Popov. Trad. Koljo Panĉev. Sofio: BEA, 1986. 118 p. 20 × 14 cm. Ilustrita. Prezo: 0.45 lv./8.90 gld.

Bonhumoraj kaj amuzaj rakontetoj pri fama figuro el la bulgaraj popolaj fabeloj.
SUB LA JUGO, Ivan Vazov. Pluraj tradukintoj. Sofio: BEA, 1982 (ofseta represo de la unua eldono) 21 × 15 cm. Prezo: 3.20 lv./18.00 gld.

La plej fama romano en la bulgara literaturo; interesa el literatura kaj historia vidpunktoj. Kun antaŭparolo de akad. P. Dinekov.

ŜTELISTO DE PERSIKOJ, Emilian Stanev. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press, 1986. 130 p. 20 × 12 cm. Prezo: 1.10 lv./6.80 gld.

Du noveloj kaj kelkaj rakontoj de konata bulgara prozverkisto.

TANGO, Georgi Karaslavov. Trad. Nikola Uzunov kaj Petâr Todorov. Sofio: Sofia Press, 1988. 94 p. 23 × 15 cm. Prezo: 0.85 lv./9.00 gld.

Atentokapta novelo pri du mondkonceptoj.

TRA LA VENTEGO, Ĥristo Smirnenski. Pluraj tradukintoj. Sofio: Sofia Press. 1986 (tria kompletigita eldono). 144 p. 23 × 16 cm. Prezo: 1.08 lv./7.50 gld.

Poezio kaj prozo de elstara proleta verkisto. Kun ampleksa enkonduko de Georgi Canev.

VILAĜO BOROVO. Krum Velkov. Trad. Asen Grigorov. Budapest: HEA, 1983. 130 p. 20 × 15 cm. Prezo: 0.79 lv.

Romano pri okazaĵoj en bulgara vilaĝo dum la antifaŝisma ribelo en la jaro 1923.

ALIAJ LIBROJ

ESPERANTISTA KONTRIBUO POR AMIKECO KUN SOVETUNIO. Trad. el la rusa en la bulgaran kaj en Esperanton Nikolao Brezin. Sofio: Sofia Press, 1987. 228 p. 22 × 15 cm. Prezo: 1.80 lv./5.60 gld.

Historia skizo.

NESTO DE BIRDOJ, antologio. Sofio: BEA, 1987. 238 p. 22 × 15 cm. Prezo: 1.10 lv./10.80 gld.

Enhavas originalajn kaj tradukitajn verkojn kaj skizon pri la E-movado en Ĥaskovo. Kun multaj fotoj.

TIMUR KAJ LIA TAĈMENTO, Arkadij Gajdar. Trad. el la rusa. Budapest: HEA, 1982. 72 p. 20 × 14 cm. Prezo: 1.00 lv.

Aventura romano; klasikaĵo en la sovetia junulara literaturo.

PERIODAĴOJ

BULGARA ESPERANTISTO. Sofio: BEA. Prezo de unuopa numero de 1987/88-a jaro: 0.30 lv./1.50 gld.; la jarkolekto kostas 15 gld. Prezo de unuopa numero de 1989: 0.50 lv./3.00 gld. Laŭ interkonsento kun la Unuigita Redakcio ĉe BEA haveblas ankaŭ apartaj numeroj el malpli novaj jarkolektoj.

La revuo estas organo de Bulgara Esperantista Asocio. Ĝi pritraktas problemojn de la landa kaj la tutmonda E-movado kaj konigas al eksterlandanoj la bulgaran historion kaj kulturon. Ekde septembro 1988 ĝi aperas en nova formato kaj pli moderna teknika aranĝo.

JUNA AMIKO, Budapest: HEA (aŭspiciata de ILEI). Prezo de unuopa numero: 0.60 lv.

Trimonata revuo por lernantoj kaj komencantoj. Gaja enhavo kaj facila lingvaĵo. Haveblas la numeroj 3—4/86, 1—4/87 kaj 1—4/88.

PANORAMA ESPERANTO, Sofio: BEA. Prezo de unuopa numero: 0.50 lv. Nova dumonata bulgarlingva eldonaĵo por informado kaj varbado en neesperantistaj medioj.

GRAMOFONDISKOJ

BULGARA ROZO, kantas Jana Cikalova. Sofio: Balkanton. 30 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 2.30 lv./18.00 gld.

Enhavas 15 esperantigitajn kantojn de nuntempaj bulgaraj komponistoj.

BUNTAJ KRAVATOJ — infana kantgrupo. Sofio: Balkanton. 18 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 0.70 lv./6.00 gld.

Enhavas la kantojn „Infanaj sonoriletoj“ kaj „Infanoj de la tuta mondo“.

JUBILEA KONCERTO, kantas Veselin Damjanov. Sofio: Balkanton. 30 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 2.30 lv./24.00 gld.

Sep popularaj operaj kaj operetaj arioj kaj sep originalaj kantoj de la konata esperantisto-kantisto. Kun tekstoj.

KANTAS MIŜO ZDRAVEV Sofio: Balkanton. 18 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 0.70 lv./6.00 gld.

Enhavas du kanzonojn en Esperanto.

KORUSO DE INSTRUISTINOJ-ESPERANTISTINOJ. Sofio: Balkanton. 18 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 0.70 lv./6.00 gld.

Enhavas „Ni gardu la pacon“ kaj „Patrujo“.

NI VIVOS! Julian Modest. Sofio: Balkanton. 30 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 2.30 lv./21.00 gld.

Dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto. Plenumas aktoroj de Bulgara Esperanto-Teatro.

RIBELA KORDO, Ĥristo Gorov. Sofio: Balkanton. 30 cm. Duflanka, stereofona. Prezo: 2.30 lv./21.00 gld.

Poemoj de konata bulgara poeto-esperantisto.

DIVERSAĴOJ

INSIGNO — emblemo de IEK-Pisanica. Pinglo. 0.40 lv./2.60 gld.

INSIGNO — verda stelo sur blanka cirklo kun orkolora rando. 14 mm. Pinglo. 0.30 lv./2.10 gld.

JUBILEAJ KOVERTOJ — korespondkovertoj kun portreto de Zamenhof. Prezo de 100 kovertoj: 8.00 lv./24.00 gld.

JUBILEAJ MARKOJ — kun portreto de Zamenhof kaj jubilea simbolo. Prezo: 0.13 lv./3.00 gld.

PLAKATO — multkolora portreto de Zamenhof. Formato A3. Prezo: 0.32 lv./2.60 gld.

ŜLOSILTENILO el ledo. Prezo: 2.50 lv./7.50 gld.

Bulgaroj povas aĉeti ĉiujn titolojn en la Librovendejo de BEA aŭ mendi ilin ĉe la Unuigita Redakcio de BEA. La Unuigita Redakcio sendas poŝtrepago (s nalojen platej) librojn, gramofondiskojn ktp., se sume ili kostas pli ol 10 lv. Oni indiku klare: 1. propran, ĝepatran kaj familian nomon; 2. adreson kaj telefonnumeron; 3. titolon; 4. kvanton.

Eksterlandanoj mendu la bulgarajn E-eldonaĵojn ĉe UEA.

Laŭ interkonsento eblas interŝanĝo de libroj kaj esperantaĵoj inter la Unuigita Redakcio kaj E-asocioj aŭ libroservoj.

Adreso: Unuigita Redakcio ĉe BEA,
1000 Sofio, P. K. 66, tel. 22 80 86

Gazeto „La mondlingvisto“

Canko MURGIN

La unua E-gazeto en Bulgario kaj dua en la mondo

Estas ege bedaŭrinde, ke en 1988 oni povis legi jenan esperantistan misinformon; „Bulgaroj dum sia 80-jara historio ĉiam dediĉas gravan atenton al la poezia kreado“¹. Fakte temas nur pri 80-jara historio de originala Esperanto-poezio, sed ne pri la ĝenerala historio de Esperanto-movado, kiu estis 100-jara en Bulgario (1877—1987). Antaŭ ol aperi la Esperanta poezio en nia lando, la historio de Esperanto-movado jam estis preskaŭ 20-jara (1877—1906). Dum tiu unua periodo de Esperanto-movado la bulgaraj esperantistoj devis lerni kaj agiti, varbi kaj organizi. Dum tiu periodo minimume mil personoj lernis Esperanton, el ili 500 estis organizitaj en lokaj Esperanto-societoj eble nur 50 posedis la lingvon perfekte. El tiuj nur unu persono fariĝis Esperanto-poeto (Ĥristo Tonev Rjaĥovski) en 1906 kaj la dua (Petro Jordanov) aperis en 1907.

Esperanto penetris en Bulgarian ne per informo de ruslingva gazeto „Niva“ („Grenkampo“). Tiu gazeto komencis aperi apenaŭ en la jaro 1888. Lingvo Internacia venis en nian landon unu jaron² pli frue (1887). Tre verŝajne, D-ro L. L. Zamenhof mem sendis ekzempleron al Sofio kaj tiu rekte aŭ zigzage trafis en la manojn de Miloslav St. Bogdanov (1868—1914), la unua bulgara esperantisto³. Li naskiĝis en vilaĝeto Groz(n)atovci, kelkajn kilometrojn okcidente de urbo Trân. Post la Unua Mondmilito ĝi restis en Jugoslavio. Malgrandaĝa knabeto Bogdanov restis kompleta orfo (sen gepatroj). En lernejo li elstariĝis per siaj lernemo kaj diligenteco. En 1877, apenaŭ 19-jaraĝa li redaktis gazeton „Bâlgarski Novini“ („Bulgaraj Novaĵoj“). En ĝi estis rubriko lingvologia kaj li pledis por fonetika ortografio de bulgara lingvo. Jam fine de novembro 1877 li havis la Unuan Libron de Lingvo Internacia, lernolibro por ruslingvanoj, aperinta en julio 1887.

1. Politika manifesto de Bogdanov fariĝis komenca platformo de bulgara esperantista movado (Surpaperigita en somero de 1889). „La amikoj de Lingvo Internacia el diversaj landoj kaj nacioj, ĉiam pli kaj pli (intense: C. M.) interkonatiĝas kaj amikiĝas, fariĝante nedisigebla tuto, spite al la altruda politiko, spite al la maljusta kaj nematura disigo de tiu (homo, nacio: C. M.) disde alia.

Rezulte de tiu disigo okazas kaj okazos (ĝis kiam la monarĥoj bonvolos abdiki sian tronon, laŭ la ekzemplo de eks-imperiestro brazila Don Pedro...) kruelaj, funebraj kaj katastrofaj aventuroj por la gloro kaj amikiĝas, fariĝante nedisigebla tuto, spite al la administracio klopodas energie — por teni en senscio la homaron kaj por organizi plej kruelajn tragediojn — sen havi kompatemon, sen havi mizerikordon al la bonanima homaro, kaj ili kondukas tiel same, kiel buĉisto al la humilaj kaj bonanimaj ŝafoj.



Miloslav Bogdanov en 1909

Sed fine de jarcento XIX, la homaro vekiĝas el sia dormo profunda, rapidante helpi al si mem, por pli baldaŭa interkompreniĝo kaj por sia unueciĝo en unu familion internacian. Pro tio, la fonditaj jam Klubo estas en kontakto nerompebla inter si kaj simpatianta unu al alia pere de Lingvo Internacia, ili samtempe estas en konkuro inter si pri eldonado de verkoj kaj periodaĵoj. Tiuj kontribuas al pli rapida ellerno, adopto kaj perfektigo en Lingvo Internacia, de anonima aŭtoro D-ro Esperanto.

Por ekzemplo, mi mencias nur la jam fondita „Klubo Esperantista“ en Sofio, Bulgario, kiu sin devigas eldoni (per subteno de siaj kaj anoj kaj simpatiantoj)

presorganon sub titolo „La Mondlingvisto” por unuigi kaj eduki per tiu gazeto ĉiujn amikojn, adeptojn kaj simpatiantojn al Lingvo Internacia kaj pli speciale la bulgaran legantan publikon sen diferenco pri sekso kaj aĝo, sed ankaŭ la novajn Klubojn, eventuale starigotajn en Bulgario, kiel filiojn de la jam ekzistanta Klubo en Sofio. En Germanio ankaŭ funkcias Klubo, sub nomo „Mondlingva Klubo” en Nurnbergo, kiu eldonas gazeton „La Esperantisto” por la amikoj de Lingvo Internacia⁴.

Tiu manifesto de Bogdanov fariĝis platformo de organizita esperantista movado en personeco de Klubo Esperantista en Sofio ekde oktobro 1889. Ĝi estis presita en decembro 1889⁵ kaj represita en februaro 1890⁶. Plue ĝis nun tiu teksto neniam estis represita, neniam estis komentita, neniam estis menciita, sed ties ideoj, kvankam naivaj, kvankam utopiismaj vivis laŭ maniero de popola tradicio, kiu estas transdonata de esperantisto al nova esperantisto kaj de generacio al nova generacio. Nun tiuj ideoj fariĝas aktualaj, realismaj kaj ili okupas sian modestan, sed propran, lokon en la ideologio de nuntempa Nova Pensado pri restrukturigo de la homaro al komunehoma, internaciisma vivo sen militoj, sed en amikeco, konkordo, kunlaboro sur principoj de humanismaj rajtoj de homoj.

Vere, la esperantistaj ideoj de Bogdanov estis kaj naivaj, kaj utopiaj, sed li batalis por ties realigo kaj multe suferis: defendante Esperanton, li defendis ankaŭ socialismon (1894). En la sama jaro Bogdanov partoprenis mitingon en Sofio, kiu renversis diktatorecan reĝimon de Stefan Stambolov, sed Bogdanov estis kruele batita de polico kaj oni (liaj amikoj) lin portis al lia loĝejo, droninta en propra sango kaj duonmorta. En 1903 li estis eksigita el Klubo Esperantista en Sofio (fondita de li en 1889 kaj restarigita de li en 1902), sed Bogdanov ne ĉesis agadi por Esperanto kaj por renovigo de la tuta mondo ĝis la lasta bato de lia nobla, homama koro (1914)⁷.


2. Bogdanov — kreinto de esperantistaj ĵurnalismo kaj epistola belliteraturo en Bulgario. Laŭ privata vojo (per korespondado) Bugdanov eksciis, ke la unua esperantista organizo en la mondo — la Mondlingva Klubo en Nurnbergo, eldonos monatan organon en Lingvo Internacia. Bogdanov decidis, ke Bulgario ne devas postrestii. Ĝi devas havi landan presorganon, esperantistan organizon kaj lernolibron de Esperanto por bulgaroj. La materialoj por aperigo estis jam pretaj.

En aŭgusto 1889 li vizitis presejon por preparoli la presigon. Neniu presejo havis eblecon presi tekstojn kun supersignoj. Neniu presejo promesis havigi al si tiajn literojn. Bogdanov preparolis la eldonon sub kondiĉo, ke li mem havigos la mankantajn tipojn de literoj. Li mendis en Vieno. Post iom pli ol tri monatoj la novaj litertipoj venis el Vieno. Esperantista Klubo de Sofio estis fondita komence de oktobro 1889. En decembro 1889 aperis n-roj 1 kaj 2 de gazeto la Mondlingvisto. En januaro 1890 aperis n-ro 3, en februaro 1890 aperis la lernolibro de Esperanto por bulgaroj, kompilita de M. St. Bogdanov. En 1891 aperis gazeto „La Espero”, II, 4, junio 1891 (ĝi estas daŭrigo de „La Mondlingvisto”). En la jaroj 1893 kaj 1894 monata gazeto „Svjet” („Mondo”), disponigis kelkajn paĝojn al la Esperanto-movado en ĉiu kajero.

Ekde 1889 Bulgario neniam restis sen esperantista organo.

Rolon de ĉefartikolo en „La Mondlingvisto”, I, 1, ludas la „Malkovra (Malfermita: C. M.) Letero”, de Bogdanov. Ĝi estas presita paralele en du lingvoj (bulgara kaj Esperanto). Jen la kompleta teksto de tiu unua verko de bulgaro en Esperanto, originale verkita:

„Elirante unuan fojon antaŭ la estimata publiko, mi sentas la devon antaŭ ĉio danki la legantan publikon por la viva kunsento, kiun ĝi montris kaj montras de tago sur tago, kaj de horo sur horo por mia afero. La multaj promesoj, kiujn mi recevas, kiel kaj la leteroj kun kuraĝigoj kaj konsiloj — ĉio ĉi montras al mi, ke mia profunda kredo je homaro min ne trompis. La bona genio de la homaro vekiĝis: de ĉiuj flankoj al laboro ĉiuhoma venas amasoj, kiuj ordinare estas tiel



maldiligentaj, por ĉia nova afero; junaj kaj maljunaj, viroj kaj virinoj — rapidas porti ilian (sian: C. M.) ŝtonon por la granda, grava kaj utilega konstruo.

Vivu la homaro, vivu la frateco de la popoloj, vivu eterne!⁸

(M. S. Bogdanov)

Tiamaniere Bogdanov fondis antaŭ 100 jaroj la Esperantaj ĵurnalismen, (ĉar la letero estas uzita anstataŭ ĉefartikolo) kaj samtempe ankaŭ — Esperantan epistolitan literaturon; ĉar ĝi estas letero al la legantoj. En „La Mondlingvisto”. I, 2, de decembro 1889 aperas nova Letero en la loko de ĉefartikolo. Tio signifas, ke Bogdanov ne nur iniciatis la komenciĝon de Esperantaj ĵurnalismo kaj epistola literaturo, sed plu kontri-

buas por ties disvolvo. Jen estas lia dua originala verko en Lingvo Internacia:

„Sofio, 11/23 Decembro 1889

Karaj Amikoj!

En mia batalo por nia sankta afero mi turnas min kun peto al ĉiuj veraj amikoj de la lingvo „Esperanto“ kaj mi esperas, ke Vi ne rigardos sen partopreno mian malfacilan laboron kaj ne lasos min fali, sed (vi: C. M.) oferos ame al mi manon de helpo.

Amikoj! En Viaj manoj sin trovas nun la sorto de afero de grandega graveco! Se Vi donos al mi Vian helpon, tiam nia afero estas gajnita kaj la homoj eterne benados la finon de XIX jarcento.

En la nomo de bono de l'homaro, kiu estas egale kara por mi kaj por Vi. Mi esperas Vian helpon, kiun Vi alportos al mi, se ĉia amiko de nia afero gajnos nur ok abonantojn por miaj gazeto „La Mondlingvisto“ kaj Plena Lernolibro por la mondlingvo de D-ro Esperanto.

Kun kora saluto mi restas Via plej humila: M. S. Bogdanov,

redaktoro de „La Mondlingvisto“ kaj
prezidanto de la „Klubo Esperantista“⁹.

Tiuj du originalaj verkoj de Bogdanov havis ankaŭ didaktikan signifon, ĉar ili estis presitaj en du lingvoj (Esperanto kaj bulgara). Oni povis multon lerni komparante la dulingvajn tekstojn.

La ceteraj paĝoj de la gazeto „La Mondlingvisto“ estas okupitaj de lernolibra materialo. Oni trovas, en kajero 1, la faman „Antaŭparolon“ de Zamenhof kaj ĉiujn legaĵojn kaj el Unua Libro (1887) kaj el la Dua Libro de l' „Lingvo Internacia“ (januaro 1888). En kajero 2 estas Plena Gramatiko kaj en kajero 3 oni reprene Esperanta-bulgaran vortaron.

En ĉiu kajero estas diversaj bulgarlingvaj novaĵoj, reklamoj, komentoj...

Fine de 1889, la Klubo Esperantista en Sofio jam havis 125 anojn. El la paĝoj de gazeto „La Mondlingvisto“ bulgara publiko komencis amase lerni Esperanton. Sukcesis plejparte gimnazianoj, studentoj de Universitato (ĵus fondita), poŝtistoj, kompostistoj k. a. Venis la unua venko de Esperanto en Bulgario. Pri tiu venko ni ne ĉion scias eĉ nun. Publika varbado por Esperanto komenciĝis en septembro 1889. La cirkonstancoj estis tre malfavoraj. Jam komence de 1889 en Bulgario komenciĝis propagando kaj varbado por Volapuko de J. m. Schleyer. La centra gazetaro diskonigadis, ke jam aperis lernolibro Plena Gramatiko (64 p.) kaj Granda Vortaro Volapuk-bulgara (244 p.), kun 14 000 vortoj, poŝformato, mendebla kaj ĉe la aŭtoro kaj ĉe perantoj.

La batalo inter Volapuko kaj Esperanto en Bulgario estis tre intensa kaj plenigas preskaŭ la tutan jaron 1889. Tamen, plejparte ĝi estis longa luktado inter ties ĉefadeptoj Sapunov(?) kaj Bogdanov). Certe Sapunov havis avantaĝon. Li komencis varbkampanjon (en marto-aŭgusto 1889), t. e. duonjaron pli frue ol Bogdanov. Sapunov agadis per la gazetaro kaj krome li vojaĝis tra la lando kaj agitis inter la popolo. Sapunov portis certan kvanton de sia stoko kaj li povis konkrete montri kaj la Plenan Gramatikon de Volapuko kaj la Plenan Vortaron Volapuk-Bulgaran kaj eventuale vendi al la varbitoj. Kaj li ne forgesis aldonadi, ke baldaŭ en Bulgario komencos aperi Volapuk-gazeto, se...

Bogdanov malfermis la varbkampanjon de Esperanto la (9-an) 21-an de septembro 1889. Ĝis la fino da la jaro aperis kelkaj ampleksaj artikoloj, presitaj en centra kaj provinca gazetaro. Bogdanov konis kaj Volapukon, kaj Esperanton. Li komparadis la du planlingvojn kaj elstarigadis la avantaĝojn de Esperanto kaj promesis baldaŭan aperigon kaj de Esperanto-gazeto, kaj de lernolibro kun du vortaroj. La luktado daŭris dek monatojn (de marto ĝis decembro 1889), sed ekskluzive intensa ĝi estis en la lastaj tri monatoj (oktobro-decembro) de la sama jaro.

En decembro 1889 — januaro 1890 aperis la Esperanto-lerniloj. La amaso de varbitoj por la internacilingva ideo jam povis memstare kompari la du planlingvojn. Kaj oni elektis Esperanton. La promesita Volapukgazeto ne aperis. Aperis tamen la esperantista presorgano „La Mondlingvisto“. Deko da esperantistaj familioj zorgeme gardadis dum jarcento siajn Volapuk-lernilojn kiel ateston pri konvertiĝo al Esperanto. Volapuko aperis sur la bulgara ĉielo dum dek monatoj kaj malaperis kiel nerevenebla kometo.

El manuskripto „Historio de Bulgara Esperanto-Movado (1887—1907)“

Notoj

1. Lapenna, Emilija: *Impona amaseco kun iom da talento*, p. 196—197, „Esperanto“ (de UEA), jk. 81, n-ro 995 (11), novembro 1989, p. 196.
2. Murgin, Canko: (a) *Doktoro kaj Lingvo Esperanto*, p. 28—29, „Bulgara Esperantisto“, XLIII, 10—11, oktobro-novembro 1974, Sofio, p. 28. (b) *Vero kaj famo pri la unua Libro*, p. 8—9, „Paco“, int. org. de MEM, n-ro 5, majo 1974. (c) *Gazeto „Niva“ („Grenkampo“)*, ruslingva, komencis aperi en 1888. La unuaj varbartikoloj por Esperanto aperis en jaro I, n-ro 45, de la (5-a) 17-a de novembro 1888, p. 1135 kaj en n-ro 51, de la (15-a) 27-a de decembro 1888, p. 1328.
3. Murgin, Canko: (a) *Miloslav St. Bogdanov (1868—1914) — La unua bulgara esperantisto*, p. 11—15, bulgarlingva, *Esperanto en servo de la Patrio, kunmetis kaj redaktis: Canko Murgin, Sofio, 1983*. (b) *La unua bulgara esperantisto*, p. 6—8, „Bulgara Esperantisto“, XLV, 7—8, julio-aŭgusto 1976.
4. Bogdanov, M. S.: *Antaŭparolo*, p. 5—6, „La Mondlingvisto“, I, 1, decembro 1889.
5. Same.
6. Bogdanov, M. S.: *Plena lernolibro por la mondlingvo de D-ro Esperanto, parto unua Plena Gramatiko, parto dua Vortaro Internacia-Bulgara kaj parto tria Vortaro Bulgara-Internacia (t. e. Esperanta: C. M.) Apudpalaca Presejo, Sofio, 1890*, p. 5—6.
7. Noto 3.
8. (a) Bogdanov, M. S.: *Malkovra Letero*, p. 2—3, „La Mondlingvisto“, I, 1. (b) Murgin, Canko: *Historio de bulgara Esperanto-movado, Kajero Unua (1885—1890)*, p. 10—14, Kokemäki, 1964, Finnlando.
9. (a) Noto 8, *Karaj Amikoj! En mia batalo...*, p. 55—56; (b) Noto 8, p. 12—14.
10. (a) Noto 4, *Rimarko*, p. 54. (b) Murgin, Canko: *Historio de bulgara Esperanto-movado, Kajero Unua (1885—1890)*, Kokemäki, 1964, Finnlando.





Verdaj steletoj

Karaj infanoj,

Ni gratulas vin okaze de la 1-a de junio — Internacia Tago de la Infano kaj bondeziras al vi sukcesojn en la ekposedo de Esperanto.

La Internacia Lingvo jam multfoje pruvis dum la Internaciaj Infanaj Kongresetoj kaj dum aliaj infanaj renkontiĝoj sian taŭgecon esti rimedo de proksimiĝo kaj amikiĝo de infanoj el diversaj landoj. Regante Esperanton, vi povas uzi ĝin aktive, eniri en skribajn kaj personajn kontaktojn kun viaj samaĝuloj el tuta mondo. Tiel vi edukas vin en spirito de reciproka kompreniĝo, internaciismo kaj paca kunvivado.

Ni klopodos ankaŭ estonte aperigi en Infana rubriko „Verdaj Steletoj” intereskaptajn kaj instruajn legaĵojn, versaĵojn kaj fabelojn por via distro kaj lingva perfektigo.

LA REDAKCIO



Kial la rano ne havas voston

AFRIKA FABELO

Oni rakontas, ke en jam delonge pasintaj tempoj ĉiuj bestoj en la arbaro primokis la ranon, ĉar ĝi ne havis voston. La rano ofendiĝis kaj iris al dio de la ĉielo Njama elpeti por si voston.

La dio de la ĉielo aŭskultis la peton de la rano, iom pensis kaj diris:

— Mi havas tian puton, kie la akvo neniam malaperas. Do por tiu puto mi bezonas gardiston. Se vi konsentos fariĝi gardisto, vi ricevos voston.

La rano konsentis.

— Bone, mi fariĝos la gardisto, vi nur donu al mi voston.

Njama kreis al la rano voston kaj sendis ĝin al la puto, dirinte:

— Nu, iru kaj plenumu vian laboron. Zorgu, ke la puto ĉiam estu pura, por ke ĉiu preterpasanto povu estingi sian soifon. Direktiĝis la rano al la puto kaj ekloĝis en ĝi.

Sed jen foje ekestis sekeco. Jam longan tempon ne pluvis, kaj ĉiuj putoj sekiĝis. Nur en la puto de dio Njama estis akvo. La rano estiĝis tro fieraj, orgojla kaj simple netolerebla.


Kiam jam nenie estis akvo, la bestoj iris al Njama kaj petis akvon de li. Kaj la dio sendis ilin al sia puto, kiu neniam sekiĝis.

Unua venis trinki bubalo. Aŭdinte, ke la bubalo alproksimiĝas, la rano ekkvakis:



Foto de la numero: Patrino ĉirkaŭpreno.

Foto: Silva ZAKARJAN



— Kiu venas malpurigi la akvon en la puto de Njama?

— Tio estas mi, la bubalo, — respondis la bubalo.

— Iru for! Ne estas akvo por vi. La puto sekigis! — ekkriis la rano. La bubalo foriris sen trinki akvon.

Poste al la puto alvenis la ŝafo kaj la rano denove ekkvakis:

— Kiu venas malpurigi la akvon en la puto de Njama?

— Tio estas mi, la ŝafo.

Kaj la rano ekkriis:

— Tuj foriru! Ne estas akvo por vi. La puto sekigis! — Foriris ankaŭ la ŝafo, suferante pro soifo.

Al la puto de Njama venis gazelo, la apro, la bovino kaj la elefanto, kaj ilin ĉiujn la rano pelis for de la puto.

— Iru for! Tie ĉi ne estas akvo. La puto sekigis!

Fine por ĉiuj vivantaj estaĵoj, loĝantaj en tiuj lokoj, la manko de akvo estiĝis neelportebla. Kiam al Njama venis onidiro, ke la bestoj pereas pro soifo, li mem direktiĝis al la puto, dezirante vidi kio tie okazas.

Aŭdinte liajn paŝojn, la rano kvakis:

— Kiu venas malpurigi la akvon en la puto de Njama?

Njama severe diris:

— Tio estas mi, Njama!

Sed la rano, laŭkutime, kvakis responde:

— Iru for! Ĉi tie ne estas akvo. La puto sekigis!

Aŭdinte tiujn vortojn, Njama terure kole-rigis. Li kaptis la ranon je la vosto kaj deŝiris ĝin, kaj la ranon li pelis for.

Tiel la rano denove restis sen vosto.

Nun la rano ĉiam vivas apud akvo, rememorante siajn plej bonajn tagojn, kiam ĝi gardis la puton de Njama mem.

Sed Njama konstante rememorigas al la rano, kiom da malbono ĝi kaŭzis al ĉiuj. La ranoj naskiĝas kun vosto, sed kiam ili iom elkreskas, Njama forprenas de ili la voston.

Esperantigis: Lidia RAEVA

Grafikaĵo: Penka PETKOVA

En la Redakcio de tempo al tempo ni ricevas leterojn de niaj legantoj kaj kunlaborantoj, en kiuj ili demandas pri konkretaj gramatikaj problemoj. Elena Atanasova el Varna skribas:

„Kara Redakcio,

Al mi tre plaĉas via rubriko „Por nia lingva perfektigo“.

Dankon al Kunĉo Vâlev pro lia interesa artikolo „Danĝeraj verboj“ (n-ro 12/1988). Mi konsentas kun Bernard Golden (n-ro 1/1989), ke niaj konoj ne sufiĉas.

Mi proponas al vi, ke vi skribu pri la vorteto „ĉi“. En diversaj libroj kaj revuoj mi vidis diversajn skribmanierojn kun aŭ sen streketo: ĉi-tie, ĉi tie, tie-ĉi, ĉi-tiu ktp. Kaj la esperantisto skribas ĝin laŭ sia plaĉo. En niaj lernolibroj oni skribas nur kelkajn vortojn pri ĝi. Ĉu vi povas respondi en via rubriko, kiam ni uzas streketon post ĉi kaj kiam ne?”

Ilija Andreev el Ŝumen turnis al ni atenton rilate esperantigon de tipaj bulgaraj vortoj kiel *martenica*, *survaknica* k. a.

Al tiuj demandoj ni petis respondon de nia konsultato pri lingvaj demandoj — Violin Oljanov. Jen liaj notoj.

„BE“

LA UZO DE LA PARTIKULO ĈI

Ĉi montras proksimecon en la loko aŭ la tempo. Plej ofte ĝi estas uzata kun tabel-vortoj: tie ĉi, ĉi tie, tien ĉi; tiu ĉi, tiun ĉi, ĉi tiu, ĉi tio.

La ekzemploj montras, ke ĉi povas stari kiel post, tiel same antaŭ la pronomo. Ĝi neniam ligiĝas kun ĝi per streketo. Se la distanco ne gravas, ni povas ellasi ĝin.

En iuj kazoj, precipe en poezio, oni ellasas la pronomon kaj uzas sola ĉi:

En ĉi momento... (anst. en tiu ĉi momento)

... disrompu ĉi karbon — ĉi sklavajn animoj kun ĝi! (Ĥr. Smirnenski, tr. Asen Grigorov).

Oni povas prefikse uzi ĉi kun adverboj kaj adjektivoj kun senco de plejproksimeco: ĉi-kune, ĉi-sube, ĉi-apude, ĉi-foje, ĉi-rilate, ĉi-flanke, ĉi-monate, ĉi-loke, ĉi-kaŭze, ĉi-jara (festivalo), ĉi-rilata (konduco), ĉi-printempa (vetero), la ĉi-urbaj (stratoj).

Kiel videble en la ĉi-supraj ekzemploj, en tiuj okazoj ĉi estas ligita per streketo kun la adverbo aŭ la adjektivo. Tio estas necesa, ĉar ĝi estas uzita prefikse, do ĝi kun la radikalo konsistigas unu vorton. Se ni ne uzas streketon, ni ŝanĝus la sencon, kiel estas montrite supre („ĉi sklavaj animoj“ anstataŭ „tiu ĉi sklavaj animoj“). Tia anstataŭigo de „tiu ĉi“ per „ĉi“ estas evitinda.

PRI LA TRADUKO DE IUJ BULGARAJ VORTOJ

La folkloraj terminoj kiel *martenica*, *survaknica* k. a., kiuj ofte estas unikaj apartaĵoj, ordinare ne estas tradukeblaj. La samo validas pri iuj administraj, burokratismaj, kulinaraj vortoj, terminoj de la nacia ekonomio ktp. En tiuj ĉi okazoj ni uzas la vorton en ĝia nacia formo kun sublinia referenco aŭ enkrampa klarigo. Mi provos tie ĉi montri kiumaniere plej precize kaj koncize klarigi aŭ traduki tiujn kaj aliajn folklorajn vortojn.

Martenica — bulgara marta ruĝblanka fadenornamaĵo.

Survaknica — novjara branĉogrutulilo.

Survakar — novjara branĉogrutulisto.

Koledar(o) — kristnaska kantgratulisto.

Nestinar(o) — braĝdancisto (en la Bulgara-Esperanta vortaro estas proponita traduko „fajrodancisto“; tio ne estas tre ĝusta, ĉar la nocio „fajro“ entenas ideon pri flamo, kaj efektive ja tio ne devas esti).

Lazaruvane — dancado omaĝe al Sankta Lazaro.

Lazarki — dancistinoj okaze de la festo de Sankta Lazaro, Lazardancistinoj.

Zagovezni — antaŭkaresma vespermanĝo.

Violin OLJANOV,
membro de la
Akademio de Esperanto



ATENTOKAPTA AŬTORO

Boris Ĥristov estas unu el la plej interesaj nuntempaj bulgaraj poetoj. Naskita en 1945, li finis bulgaran filologion en la Universitato de Veliko Târnovo. Aŭtoro de du verskolektoj — „Vespera trumpeto” kaj „Sankta kruco”, de la romano „La patro de la ovo” kaj de kelkaj kino-noveloj.



Boris ĤRISTOV

VESPERA TRUMPETO

*La vivo nin rulas sub arda sunbrilo,
ni rampas kaj stumblas sur vojo ŝtonplena...
Sed kiam vespero etendos flugilojn,
eksidos mi tiam sursojle, trumpeton mi prenos.*

*Sufiĉe vagadu mi preter la muroj
samkiel ektinto de sonorilo truhava, molesta.
Mi devas trumpeti, mi devas detrui
ĉi tiun silenton — la krio nur restu.*

*Ke baldaŭ ektondru la vento varmega,
malfermu ĝi plene la pordojn facile.
Kaj ree postiru la tero grandega
al marŝo krucista de l' griloj.*

*Mi volas disŝiri nun per mia kanto
jen tiun pikdraton antaŭ via domo.
Mi volas, ke li, najbarul' — simulant,
tuj ĉesu surdmuti kaj estu jam bona.*

*Mi volas ekvidi ŝteliston kun brakoj krucitaj,
gardiston kun kor' aĉetita, sed vera.
Mi volas, ke miaj larmoj subite
ekgutu super l' okul' rustiginta danĝere.*

*Mi volas, ke baldaŭ forblovu la polvon mucidan
foiro al ni reveninta, tre brua.
Mi volas ekvidi jam morta pro tiklosento kaj rido
la homon mortantan nun por la enuo.*

*Mi volas, ke ni gardostaru eĉ ĝis la tagiĝo
antaŭ niaj mortintoj — atente, zorgeme.
Kaj volas mi diri al ĉiuj dormantaj: „Sufiĉe,
ja havas ni tempon satdormi senĝene.”*

*Mi devas trupmeti en tiu ĉi nokto silenta,
ĝis kiam mi aŭdos venantan de fore, libere
la sonon de miloj da bonaj trumpetoj.
Aŭ de iu nevidebla arĥiangelo.*

LA VIRINO MARIA

*Ŝi venis kun piroj kaj peceto da pano en sako,
ŝetis sian ŝaleton en miajn manojn instinkte
kaj ekflustris: „Mi estas Maria... Kaj estas mi ankaŭ
la virino de ĉiuj viroj kaj eĉ de l' mortintoj.”*

*Ŝi konsternis min plene
kaj ekkaŝis sin tuj sub littuko kotona.
Mi eksvenis ĉe ŝiaj du fajnaj pintetoj en la mallumo.
Kunpremiĝis ni ambaŭ
kaj krakis ni kiel akvomelonoj,
eĉ ĝis kiam fendigis la dorso de l' suno maljuna.*

*Tamen vane bruletis mia kandelo kaj vane elfluis
varma lakto el la okulo de mia tekruĉo bizara —
same kiel infano kuranta
perdiĝas en la polvo de l' ludoj,
tiel ŝi malaperis malantaŭe
la blanka vapore de l' vagonaro.*

*Nun kun piroj kaj peceto da pano en sako
ŝi alie jam estas
kaj eble ŝi pretas ekflustri instinkte:
„Jen mi venis... Mi estas Maria... Kaj estas mi ankaŭ
la virino de ĉiuj viroj kaj eĉ de l' mortintoj.”*

*Estingiĝos finfine la meĉo kaj ŝi edzinigos
al hometo ĵaluza, kun dentoj el oro, tre akurata.
Kaj obeos ŝi lin kaj vivaĉos ŝi stulte
kaj malfeliĉe,
katenita per bukoj kaj ligita per multaj kravatoj.*

*Kaj ŝi kiam eksentos la morton, eliros eksteren
kaj briligos la ŝuojn kovritajn per polvo —
por pretigi sin al la vojaĝo.
Kaj ekflugos ŝi poste al nubo,
post la aro de anseroj,
sen eksvingi la manon eĉ al tiu,
kiu staras sursojle domaĝa.*

*Kaj kun piroj kaj peceto da pano en sako
ŝi atingos la paradizon
kaj ekkrios al la gardistoj instinkte:
„Jen mi venis... Mi estas Maria... Kaj estas mi ankaŭ
la virino de ĉiuj viroj kaj eĉ de l' mortintoj...”*

LA SOLULO

*Sur sia frunto li cikatron havas
kaj sidas ĉiam ĉe la rando.
Eĉ kiam estas tre altkreska,
li, la solulo, estas tre malgranda.*

*Drogherbojn li kolektas
aŭ, se estas sen laboro,
li tajlas per la adzo de la rememoroj.*

*Se ie, en herbejo, brilas kapo de ĉevalo,
li iras simple vidi ĝin,
kaj ne pro ĝia kolhararo.*

*Dum aliuloj krias kaj parolas pri la arto,
li kaptas muŝojn kaj ellasas ilin ĉe la tablo.*

*Sed se li verkas poezion, nepre lasos tiam
en la okuloj larmon, strekon en memoro via.*

*Li havas domon, varman supon, tamen lia viv' angora
fermita estas — kiel kaso forĵetita en la koridoro.*

*Kaj eĉ lia domo iam falos renverse,
li cindron povus manĝi, sed neniam petos iun.*

Tradukis: Venelin MITEV



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

En la Buroo de CE de BEA

En sia kunsido la 28-an de marto k. j. la Buroo de Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio decidis plivastigi la konsiston de Komisiono pri Internacia Agado konforme al la decidoj de la Plenkunsido de CE de BEA, okazinta la 11-an de februaro ĉi-jare. Estis akceptitaj jenaj novaj membroj: doc Stojĉo Stojĉev, Radoslav Paraŝkevov — reprezentanto de Komisiono pri Organiza Agado, Belka Beleva — reprezentanto de Komisiono pri Kulturo, Andrej Angelov — reprezentanto de Komisiono pri Instruagado, Valentin Genĉev — reprezentanto de Junulara Sekcio ĉe BEA, kaj direktoro de Buroo pri E-Turismo.

En la sama kunsido estis aprobitaj **delegitoj de BEA** por la 22-a Konsultiĝo de E-Asocioj el la Socialismaj Landoj, de la 17-a ĝis la 23-a de aprilo k. j. en USSR — Dimităr Papazov, Cvetka Miteva, Dimităr Dimitrov kaj Metodi Garev.

Oni decidis okazigi senpagan kvalifikan kurson pri metodiko por neprofesiaj instruantoj de Esperanto, de la 22-a ĝis la 27-a de majo 1989 en IEK-Pisanica.

Estis aprobita propono de la prezidanto de Komisiono pri Kultura Agado, ke la E-kulturdomoj funkcii kiel institucio pri kulturamasa laboro de la koncernaj lokaj E-societoj. La rezultantaj de tio postsekvoj estu respegulitaj en la Statuto de E-Kulturdomoj.

Estis aprobita propono de Komisiono pri Instruagado rilate partoprenon de E-instruantoj Penka Bujuklieva el Gorna Orjaĥovica kaj Nikola Uzunov el Ĥaskovo en 7-a Internacia Metodika Seminario en Poprad, Ĉeĥoslovakio (26—30.04.1989) kaj de E-instruantoj Antoaneta Nikolaeva el Opaka, Razgrad-departemento kaj Kiril Velkov el Vraca en 17-a Scienca Simpozio en Varsovio, Pollando (27.04.—1.05.1989).

La Buroo de CE de BEA en sia kunsido la 4-an de aprilo pritraktis la rezultojn de mastruma agado de Ekonomia Direkcio „Globus“ kaj ties filioj por 1988 kaj aprobis la projektoplanon por 1989. Ankaŭ estonte estos apartigita procentaĵo el la dekalkulo de la profito de ED „Globus“ por la agado de BEA. La Buroo opinias, ke oni devas daŭrigi la klopodojn de la direkcia estraro kaj ties entreprenoj por aĉeto kaj ekposedo de nova tekniko kaj modernaj teknologioj de produktado, por rekonstruo, modernigo kaj konstruo de nova teknika bazo kaj por plialtigo de la kvalito kaj rendimento de la produktado. Surbaze de Dekreto N-ro 56/11.01.1989 de Ŝtata Konsilantaro de PR Bulgario oni decidis, ke ED „Globus“ transformiĝu en firmaon — kun direktoro Jordan Veselinov. La nova firmao „Globus“ estis registrita en Sofia Urbo Tribunalato.

E. G.

Okaze de la 100-jara datreveno de la fondiĝo de bulgara Esperanto-movado kaj de ties fondiĝo — d-ro de jursciencoj Miloslav Bogdanov, la 21-an de marto k. j. en la Juĝeĵpalaco en Sofio okazis Renkontiĝo-Interparolo de Ĵurnalistoj. Ĝin organizis Sekcio de Juristoj ĉe BEA. Ĉeestis pli ol 50 personoj, veteranoj de la E-movado, aktivuloj, amikoj de Esperanto.

En la Prezidio okupis lokojn Nikola Aleksiev, Ĥristo Gorov, Ivan Keremidĉiev-Esperov — veteranoj esperantistoj, Ljubomir Dojĉev — verkisto, poeto, Georgi Kaljaŝki — prezidanto de la E-societo en Kjustendil, d-ro Samuil Aron — veterano.

Mallongan programon el versaĵoj en Esperanto plenumis Cvetanka Kostova, Cvetanka Uzunova kaj knabineto Maria Georgieva.

Detalan raporton pri la vivo de M. Bogdanov kaj lia kontribuo kiel iniciatinto de la E-movado en nia lando, faris Boris Atanasov, prezidanto de la Sekcio de Juristoj ĉe BEA kaj prezidanto de la E-societo en Bankja. M. Bogdanov — la unua esperantisto en Bulgario, havis gravajn meritojn. Li estis aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto por bulgarioj (aperinta somere de 1990), fondiĝo de la unua bulgara E-klubo en Sofio (en oktobro de 1889), redaktoro de la unua bulgara E-eldonaĵo „La Mondlingvisto“ (decembro 1889).

Sekvis opiniesprimoj. N. Aleksiev skizis iujn momentojn el la bulgara E-movado: la organizon de du Universalaj Kongresoj — 48-a UK (Sofio, 1963) kaj 63-a UK (Varna, 1978); la konstruadon de la Internacia Esperanto-Kursejo-Pisanica k. a. Ĥr. Gorov emfazis la meriton de M. Bogdanov pri la Unua Societo de Amikoj de Tutmonda Lingvo. Ljubomir Dojĉev interese rakontis pri sia patro Dojĉo Kolev, unu el la unuaj bulgaraj esperantistoj. Parolis ankaŭ Iv. Keremidĉiev-Esperov kaj G. Kaljaŝki.

Fine de la renkontiĝo la familio Jana kaj Miĥail Ĉobanov prezentis humuraĵojn el Sofio-departemento.

Rumjana GEORGIEVA

Titolitaj Esperanto-instruistoj

Laŭ la regularo pri honortitoloj al Esperanto-instruistoj CE de BEA ĝis decembro (la naskiĝtago de Zamenhof) devis distingigi la plej bonajn instruistojn por la jaro 1988. Pro la reorganizo de la Asocio kaj aliaj kaŭzoj ni prezentas kun malfruiĝo la atribuitajn titolojn.

A. Elstaraj lektoroj

Fani Mileva Miĥajlova — Plovdiv
Nikola Atanasov Uzunov — Ĥaskovo
Nikolaj Nedjalkov Bojaĝiev — Plovdiv

B. Rekonitaj lektoroj

Marija Vasileva Angelova — v. Ĉeŝnigirovo, dep. Plovdiv
Paraŝkeva Ĝeorgieva Bojaĝieva — Plovdiv
Cvetanka Georgieva Kostova — Sofio

La Instrukomisiono ĉe BEA gratulas la novajn distingitojn kaj deziras al ili pluan fruktodonan laboron en la kampo de la nobla instruaktiveco.



AFRIKO (Togo) Antaŭnelonge fondita Studgrupo Esperanta kaj Matematika instruas la Internacian Lingvon en liceo de Lomé.

Por sia agado la studrondo bezonas lern-materialon, matematikajn librojn kaj vortaretojn (Esperanto-franca). Estas serĉata eksterlanda klubo, kiu volas helpi per korespondado kaj instigo al la gelernantoj. Instruanto pri matematiko estus tre bonvena. Adreso: **S. E. M., Gbeglo Koffi, B. P. 13169, Lomé, Togo.**

FINNLANDO Konversacia grupo de Esperanto-societo en Turku aranĝis belan Esperanto-ekspozicion ĉe la Ŝatokupa Foiro de Turku (en novembro pasintjara), prezentante Esperanton kiel ŝatokupon, kulturen fenomenon kaj bonegan ilon por la internaciaj kontaktoj kaj amikaj rilatoj.

FRANCIO Por esti membro de la nove fondita Franca Komitato por la Apliko de Esperanto en Scienco, estas neniu kotizo sed devigo ĉiujare verki aŭ traduki almenaŭ 5-paĝan sciencon artikolon en Esperanto, prefere en prespreta

formo. Pliajn informojn donas la provizora sekretario: **Christian Bertin, 60 allée de la Renaudière, F-35510 Cesson-Sevigne, Francio.**

ITALIO La nova semajna gazeto de Pisa „La Torre” regule publikigas literaturaĵojn kaj artikolojn en la itala lingvo tradukitajn el Esperanto.

● Ekde la 30-a de januaro 1989 „Radio Idea 12”, sendependa loka Parma-a radiostacio, elsendas la Esperanto-kurson „Jen nia mondo”. Ĉiu leciono estas ripetata lunde, merkredo kaj vendredo. Adreso: **Radio Idea 12, via Bottego 3, 1-43100 Parma, Italio.**

HISPANIO (Ĉi-jare la Internaciaj Floraj Ludoj (IFL) en Barcelono festas la 80-an jubileon (ili estas fonditaj en 1909, sed poste pro politikaj cirkonstancoj dum pluraj jaroj ne povis funkcii).

Komence de novembro pasintjara en Barcelono okazis la 7-a Internacia Literatura Forumo kaj la 28-aj Internaciaj Floraj Ludoj, kun okdek da partoprenantoj, en tiu nombro eksterlandanoj el kvar eŭropaj landoj. La ĉefgajninto

triobla estas Pier Giorgio Soranzo (Italio).

Inter la premiitaj eksterlandaj partoprenintoj estas Stefka Kalimenova (Bulgario).

JAPANIO Jam dum 15 jaroj funkcias „Nagoja Esperanto-Centro — kunveno, komuna biblioteko (posedanta 750 titolojn kaj 30 gazettitolojn) kaj samtempe librovendejo. Dum la lasta jaro oni vendis Esperanto-librojn por ĉ. 23 000 gld.

POLLANDO „La „Imperiestro” aperis jam en 36 lingvoj. Kial ne ankoraŭ en Esperanto?” — estis la demando, per kiu Ryszard Kapuściński, eminenta pola verkisto, plej ofte tradukata reprezentanto de la nuna pollingva literaturo post Stanisław Lem, turnis sin al sia amiko kaj kolego Roman Dobrzyński. La tutan sumon, kiun li ricevos por la Esperanta eldono de „La Imperiestro”, Kapuściński intencas transdoni al la Fondumo Zamenhof. Do, post Jerzy Kosiński, alia vaste konata pola verkisto, li estas la dua, kiu rezignas pri sia honorario kontribue al la Zamenhof-Centro en Bjalistoko.

Junulara etoso en Ateno

Ni — du bulgaraj junuloj, partoprenis internacian junularan renkontiĝon, okazintan de la 21-a ĝis la 27-a de marto k. j. en Ateno. La aranĝo celis praktike montri la uzon de la Internacia Lingvo al grekaj amikoj de Esperanto kaj tiamaniere propagandi ĝin.

La dommastroj invitis partoprenantojn preskaŭ el ĉiuj eŭropaj landoj. Sed fakte alvenis nur kvin gastoj — po unu el Britio, FRG kaj Hungario kaj du el Bulgario. Ĉiuj ni loĝis en sufiĉe bona apartamento en la centro de Ateno — la sidejo de Helena Esperanto-Asocio. El la teraso de la lasta etaĝo videblas antikva Akropolo.



Partoprenantoj en la Internacia Junulara Renkontiĝo en Ateno sur la mitologia kabo Sunio



ADRESARO

(Daŭrigo de n-ro 5/1989)

DEPARTEMENTO DE ĤASKOVO

6300 Ĥaskovo P. K. 68
Nikola Uzunov
E-societo „Prof. Asen Zlatarov”

6400 Dimitrovgrad
bul. „D. Blagoev” 5—A
Tončo Tonev
E-societo „G. Dimitrov”

6450 Ĥarmanli
str. „Petko Napetov” 8
Todorka Janeva
E-societo „Progreso”

6550 Ljubimec
str. „Sofia” 27
Zdravko Varnov
E-societo „Ruĝa Stelo”

6489 Simeonovgrad
str. „Roza” 18
Todorka Dobroŝinova
E-societo „Trakia Lumo”

6500 Svilengrad
ul. „Makarenko” 6
Dimităr Perčemliev
E-societo „Nova Mondo”

6350 Uzunĝovo
Dimčo Penev
E-societo „Ruĝa Aŭroro”

6600 Kârĝali P. K. 62
E-societo „Stelo”
8760 Topolovgrad
ul. „Dimităr Blagoev” 24
Kina Velikova
E-societo „Espero”

6000 Stara Zagora
ul. „General Gurko” 34
Jivko Jelev
E-societo „Verda Stelo”

6200 Ĉirpan
str. „Ĥristo Smirnenski” 28
Jordan Jordanov
E-societo „Monda Amikeco”

6162 Gabarevo
E-societo „d-ro L. L. Zamenhof”

6280 Gâlâbovo
str. „St. Planina” 12
Kanjo Kanev
E-societo „Kolombo de la Paco”

6060 Dâlboki
E-societo „Marko Ivanov”

6100 Kazanlâk
P. K. 65 Dimităr Dimitrov
E-societo „Roza Valo”

6180 Mâglij
str. „13-ti septemvri” 12
Margarita Dimitrova
E-societo „Septembra Ribelo”

6155 Pavel Banja
obl. Ĥaskovska
str. „9-ti septemvri” 21
Elena Stajkova
E-societo „Progreso”

6260 Radnevo
str. „D. Sotirov” 7
Ana Jeljazkova
E-societo „Trakia Stelo”

6150 Ŝipka
str. „Predela” 2
Cvjatko Smilov
E-societo „Esperanto”



Pri la tuta organizo de la aranĝo kaj pri la ĉiutaga programo precipe zorgis f-ino Roksani Sarafian. Al ŝi helpis Silvia, Elena, Kiriaki, Vangelis kaj aliaj. Ĉiutage en nian loĝejon venis gejunuloj — studentoj kaj laboristoj. Ni ĝuis gastemecan etoson. Evidente oni atingis iujn sukcesojn en la varbado de junaj aktivuloj por la E-movado en Ateno antaŭ du jaroj — okaze de la antaŭstaranta IJK en Zagrebo oni organizis junularan kurson.

Dum la restado en Ateno Valentin Genčev, kaj mi kiel reprezentantoj de BEA kaj BEJ, kontaktis kun estraranoj de Helena Esperanto-Asocio — ges-roj Maria Pontika, Kostas Zaĥarakis kaj Spiros Sarafian. Ni konstatis, ke la rilatoj inter niaj du E-asocioj estas bonegaj. Sed oni devas pligrandigi ankaŭ la kontaktojn surbaze de la kreitaj ligoj post Unua kaj Dua Balkanaj

E-Kongresoj. S-ro Sarafian emfazis, ke la proksimiĝo de niaj landoj donas al ni bonan eblecon organizi dulandan junularan renkontiĝon.

Kelkajn vortojn pri nuntempa E-movado en Grekio. La esperantistoj estas malmultaj. La pliparto de la esperantistaro loĝas en Ateno. En Tesaloniko estas kelkaj maljunaj aktivuloj. Ĉi tie ankaŭ funkcias Esperanto-kurso. En kelkaj aliaj grekaj urboj kaj vilaĝoj estas apartaj esperantistoj. De s-ino Pontikas mi eksciis, ke nun aktiviĝas virina E-agado.

Dum la restado en Ateno ni ekkonis multe da antikvaĵoj kaj aliaj monumentoj. Estis organizita belega unutaga ekskurso laŭ marbordo de regiono Attiki ĝis mitologia kabo Sunio.

Vizitinte Atenon mi povas dividi, ke ni ekhavis ĉi tie ne nur belajn impresojn, sed ankaŭ bonajn amikojn...

Atanas ILKOV
Foto: la aŭtoro

FALERISTOJ KAJ HERALDISTOJ EN USSR

En Sovetunio estas fondita Tutlanda Klubunuiĝo de Faleristoj (TKUF). Ĝia celo estas kunordigo de la agado de kolektivoj, kies membroj kolektas memor-, ofikaj ordeninsignojn, antikvajn ordenojn ktp. Ĝi ankaŭ celas organizadon de naciaj kaj internaciaj ekspozicioj, interŝanĝon de materialoj, informoj, libroj ktp. Enkadre de la Unuiĝo ekzistas la Komisiono pri Heraldiko, kiu okupiĝas pri studado de la heraldiko mem, de antikvaj kaj modernaj urbaj blazonoj, helpas ĉe ellaboro de novaj blazonoj por la urboj de USSR. Ĝi instigas la aperigadon de novaj blazoninsignoj kaj aliaj materialoj. Nun estas planata aperigado de propra heraldika bulteno.

La Unuiĝo pretas kunlabori kun alilandaj samfakuloj kaj iliaj kolektivoj. Skribu al ni en la lingvoj: Esperanto, angla, franca, germana aŭ hispana. Adreso: Nikolaj Starodubcev (TKUF), abonkesto 191, SU—340 000 Doneck, USSR.

FILATELO



Asocio „Komunikado” en Bulgario emisiis la 22-an de februaro 1989 unu specialan serion de 6 poŝtmarkoj sub la nomo „Plantoj minacataj de malapero 1989”.

La objektoj kaj valoroj estas kiel sekvas:

Latinaj nomoj: *Ramonda serbica* — 5 st; *Palonia maskula* — 10 st; *Viola perinensis* — 25 st; *Dracunculus vulgans* — 30 st; *Tulipa splendens* — 42 st; *Rindera umbellata* — 60 st.

Aŭtoro de la projekto de la poŝtmarkoj estas la pentristo Boris Kitanov. La formato estas 25 × 50 mm, tekniko de la presado — ofseto, eldonkvanto — 220 000 kompletaj serioj.

Draguŝko PETROV

Tra la gazetaro


EN SOFIO:

Ĵurnalo „*Rabotničesko Delo*” (2.II.1989) aperigis artikolon de Georgi Tankov pri Etnografia Fakto de Historia Muzeo en u. Pazarĝik en kiu oni mencias, ke aŭtomata ilaro peras informojn pri la ekspozicio ankaŭ en Esperanto; la sama ĵurnalo (12.III.1989) publikigis sub titolo „Unuigitaj de la Internacia Lingvo” kvarkolumnan informadon de sia korespondantino por Sofio-departemento Maria Todorova pri multbranĉa aktivado de Esperanto-societo „Trifon Ĥristovski” en u. Botevgrad; la sama (3.IV.1989) aperigis informadon de sia korespondanto por Ĥaskovo-departemento Vanju Stoilov pri Nacia Revuo de Esperanta Parolo kaj Kanto en u. Stara Zagora okazinta la 1—2-an de marto; ĵ. „*Oteĉestven Fron*” (10.II.1989) aperigis informadon de Slavĉo Davidov pri la antaŭstaranta sekvontan tagon plenkunsido de Centra Estraro de BEA; en la sama ĵurnalo (24.II.1989) la sama aŭtoro informas pri antaŭstarantaj Esperantaj aranĝoj en la lando dum la unua duono de la kuranta jaro; la sama ĵurnalo (28.III.1989) presigis informon de Bonka Berova pri okazonta la 1—2-an de aprilo en u. Stara Zagora Nacia Revuo de la Esperanta Parolo kaj Kanto.

EN LA LANDO.

Ĵurnalo „*Ŝumenska Zarja*” — u. Ŝumen (6.II.1989) publikigis artikolon de Cvjatko Todorov pri la „Ora Libro” de loka Esperanto-societo „*Vekiĝo*”, en kiu en daŭro de 25 jaroj multaj eksterlandaj gastoj enskribis siajn impresojn; la sama ĵurnalo (5.III.1989) informas, ke la veterano Ilija Andreev, laboristo en la Alumina Entrepreno, gajnis la trian premion de Esperanto-elsendo de Radio Pekino; la sama ĵurnalo (17.III.1989) aperigis nekrologon pri sociaganto kaj Esperanta veterano Atanas Bojaĝiev; ĵ. „*Dunavska Pravda*” u. Ruse (14.II.1989) aperigis informon de Jordan Kalinov pri la Esperanta agado enkadre de loka Popola Legejo „*Zaĥari Stojanov*”; la sama ĵurnalo (9.III.1989) informas denove pere de Jordan Kalinov pri antaŭstaranta en aŭgusto ĉi-jara Internacia Konferenco de KEK en u. Ruse; ĵ. „*Oteĉestven Zov*” — u. Vraca (22.II.1989) publikigis artikolon de Bojĉo Mladenov pri la Semajno de Internacia Amikeco; ĵ. „*Septemvrijsko Zname*” — u. Pazarĝik (31.I.1989) informas en korespondaĵo de Konstantin Genĉev pri gastado de esperantisto el Nederlando; la sama ĵurnalo (7.II.1989) aperigis informadon de Katja Kálvaĉeva pri premiigo de infanoj el u. Pazarĝik en la Internacia Konkurso „La infanoj kaj la paco”, okazinta en Nederlando. La premiojn enmanigis sole ne gastanta nederlanda esperantisto; en ĵurnalo „*Iskra*” — u. Kazanlâk (8.II.1989) Dimo Martinov publikigis artikolon pri esperantisto-internaciisto Petâr Jonkov, pereinta por la libero de Hispanio kiel internacibrigadano en 1938; la sama ĵurnalo (11.I.1989) aperigis artikolon de Kânĉo Slavov pri centjarulo Asparuh Ivanov, esperantista-veterano; la uzina ĵurnalo „*Duma na Metalurga*” — Alumina Entrepreno en u. Ŝumen (24.II.1989) publikigis du priesperantajn erojn: artikolon de Cvjatko Todorov pri veterana esperantisto en la Entrepreno Ilija Andreev kaj informadon pri la agado de Esperanto-klubo „Metalurgo” okaze de la Semajno de Internacia Amikeco.

Krâstju KARUCIN



Deziras korespondi

BULGARIO

NOVAJ ESPERANTISTOJ, membroj de E-klubo „Metalurgo“ ĉe Entreprenejo por Prilaborado de Aluminio „St. Stamenov“, u. Ŝumen, dez. kor. kun ĉi pri ĉt.

TANJA HRISTOVA (35-jara) — 9704 Ŝumen, ul. „Trakija“ 1, ap. 6.

ZLATINKA KOLEVA (19-jara) — 9809 Vetrište, obština Ŝumen, obl. Varna, ul. „Trakija“ 22.

MILENA MAVROVA (24-jara) — 9700 Ŝumen, pl. „Stambolijski“ 14—B.

NAJDEN SOKOLOV (26-jara) — 9700 Ŝumen, ul. „Gen. Dragomirov“ 44, bl. 12, vh. III, ap. 59.

MARIJA MALEVA (17-jara) — Sofio, kv. Mladost 4, ul. 103, bl. 432, vh. 2, ap. 48 — kun ĉi pri muziko, kino, astronomio.

DINKO PAVLOV (49-jara, maristo) — 8000 Burgas, ul. „Car Samuil“ 61 — kolektas bk, pm.

MARIETA ŜOŠEVA (26-jara) — 1326 — Sofio, kv. Obelja 2, bl. 261, vh. G, et. 8, ap. 98 — kun ĉi pri ĉt.

KUBO

JOSÉ LUIS MONTES DEOCA — Calle „Jose M. Sanches“ 70, Santo Domingo Villa Glara — 53000 — kun ĉi gejunuloj el ĉi.

POLLANDO

JANISLAW DEBIEC (46-jara, instruisto) — 90—024 Lodz, ul. Wodna 18 m. 20 — kun ĉi pri turismo, literaturo kaj folkloro.

BARBARA BINIEDA (21-jara, instruistino) — 87—207 Dębowa Kąka, woj. Toruń — kun ĉi pri muziko kaj turismo.

DOROTA SZAREK (25-jara, inĝeniero pri elektroniko) — 39—400 Tarnobrzeg, ul. Waryńskiego 5 m 5 — kun ĉi pri fotoarto, turismo.

BEATA POCIASK (30-jara, kuracistino) — 28—100 Busko, os. Sikorskiego 7/14 — kun ĉi pri turismo, sporto kaj literaturo.

ELZBIETA KUŚWIK (28-jara, instruistino) — 62—800 Kalisz, ul. Bieszczadzka 4 — kun ĉi pri turismo, vojaĝoj, muziko.

MAŁGORZATA ARCISZEWSKA (22-jara) — Ośrodek Szkolenia Kadr, 21—113 Piaseczno k) Lubartowa, woj. Lubelskie — kun ĉi pri turismo, literaturo, sporto, folkloro.

MARIANNA MÓL (52-jara, instruistino) — 32—313 Bydlin, ul. Wolbromska 87 — kun ĉi pri literaturo kaj turismo.

JANINA RUDZIAK (50-jara) — 57—540 Ładek Zdrój, Skrytka pocztowa 12 — kun ĉi pri muziko, literaturo, pentroarto. Kolektas bk, pm.

SOVETUNIO

ALEKSANDR VAJSBERG (47-jara, inĝeniero) — Murmansk. obl., 184280 Monĉegorsk, Abonkesto 53 — kun ĉi pri ĉt. Kolektas pm, pk.

ESPERANTO-RONDETO (infanoj 10—14-jaraj) — 660049 Krasnojarsk — 49, ul. Konstitucii, 1. Dvorec pionerov, E-rondeto — dez. kor. tutmonde pri ĉt.

ANATOLIO DOVBIŠ (45-jara) — 245110 Ŝostka—7, Sum. p.k. 27, Ukrainio kun ĉi pri E-movado. Interŝanĝas E-aĵojn, bk, poŝt-kalendarretojn kaj E-revuojn.

BOROVKOVA NADEJDA — Vladimir—600000, ul. „Sokolova-Sokolenko“ 9—A—40 — kun ĉi pri ĉt.

ALFIJE ŜAJHUTDINOVOJ (20-jara) — Ufa. 450092, ul. „Sofia Perovskaja“ 13—r — 25 — kun ĉi pri ĉt.

NI KONDOLENCAS

La 30-an de marto forpasis en Sofio Ilia Blaĵev.

Li naskiĝis la 17-an de aŭgusto 1911 en vilaĝo Steĵerovo apud urbo Levski.

Blaĵev fariĝis esperantisto en siaj gimnaziaj jaroj kaj disvastigis la eldonaĵojn de BuLEA „Balkana Laboristo“ kaj „Mejdunaroden Rabselkor“. Dum la perarmila kontraŭfaŝisma batalo li aktivadis en Laborista Junulara Organizo kaj helpadis la partizanojn en sia regiono.

En popoldemokratia Bulgario li estis respondeca oficisto en superaj instancoj kaj diplomato en kelkaj landoj.

Post sia emeritiĝo li aktivis en societo „Ivan Krestanov“ kaj reprezentis sofiajn esperantistojn dum pluraj Universalaj Kongresoj de Esperanto.

La bulgara esperantistaro kliniĝas antaŭ lia hela memoro.

ALĜUSTIĜO

En n-ro 12/88 estas allasita preseraro en la artikolo, kompilita de Ĥr. Iskrov „Lev Nikolaeviĉ Tolstoj — eminenta patrono de Esperanto“. La ĝusta teksto estas „... ellerno de Esperanto kaj ĝia propagando estas sendube kristana agado, akcelanta estigon de l' Regno Dia, — la agado, kiu prezentas la ĉefan kaj solan mision de homa vivo“.

LA REDAKCIO

Por la someraj ferioj

Se ni deziras agrable pasigi la somerajn feriojn, ni devas anticipi pripensi kaj prepari ĉion necesan, inkluzive la vestojn, kiujn ni kunportos — nature, depende de tio, ĉu ni ferios ĉe la maro aŭ en la montaro.

Ni denove rememorigu la malnovan maksimumon — ni prefere scipovu kombini kun gusto niajn aĵojn, ol kunporti multajn, ofte ne taŭgajn por la okazo vestojn. Ja ne ĉiam la plenplena valizo egalas al alproprigitoj eleganteco kaj memsento. Racia alpaŝo al la maniero vestiĝi ĉiam estis plej grava ĉe difino de la indico pri eleganteco — des pli tio koncernas la feriojn.

La vestojn necesajn por feriado ĉe la maro oni povus dividi en tri grupojn: por la strando, por sportokupoj kaj etaj promenoj kaj por la vesperaj horoj, kiujn ni certe pasigos en amuzejoj. En tiaj okazoj konvenas, ke ni estu vestitaj en pli romantika stilo.

Por la plaĝo, oni kutime bezonas kelkajn plaĝkostumojn. Ĉi-somere estas preferataj la unupecaj kostumoj, profunde dekoltitaj ĉe la dorsa flanko — ĝis la talio. La malsupra parto de tiu speco de plaĝkostumo prezentas kalsoneton de ege malpliigitaj dimensioj, kunligitan nur kun la fermita brustoparto. Tamen daŭre estas modaj kaj preferataj ankaŭ la bikini, ĉar ili permesas al la sunradioj rekte atingi la tutan korpon. Al la plaĝbezonaĵoj apartenas ankaŭ la plaĝmantelo, plaĝtuko kaj plaĝrobo, la lasta kutime kun ŝelketo kaj plivastigita en la malsupra parto, por ke oni facile sur-



metu ĝin. La senpretendaj, freŝkoloraj kaj agrable desegnitaj teksaĵoj, el kiuj estas ellaboritaj tiuj ĉi vestoj, faras ilin praktikaj kaj oportunaj por ĉiu aĝo.

En la dua grupo de vestoj necesaj por feriado ĉe la maro aktualas varieco de pantalonej, ofte preferataj al la mallonga jupo. Estus bone, ke la pantaloneo por mara feriado estu ellaborita el mola supla ŝtofo, rezistopova kontraŭ eluzado. Aparte konvena estas la blanka koloro — ĝi estas ne nur trafe kombinebla, sed ankaŭ tre konvena al nia koloro de sunbruniĝo. Diverskoloraj sportaj trikotĉemizetoj aŭ malgrandaj sportaj trikotbluzoj estas tre konvenaj por kombinado. Karakteriza por la ĉi-jara sezono estas kombinaĵo de intense roza, helflava kaj herbverda koloroj. Nova menciinda silueto estas larĝa marista pantaloneo kun brusttolaĵo kaj jaketo. Ankaŭ ĉi-jare konserviĝas la tendenco uzi teksaĵojn kun eluzita aspekto. Mallongaj korsaĵoj kaj jaketoj de la speco „boléro” pliriĉigas la sportan temon en la somera modo.

Ĝisgenuaj pantalonetoj de la speco „bermudoj”, ŝortoj el malpezaj kvadrataj ŝtofoj, larĝaj plisitaj jupoj kun asimetriaj refaldaĵoj — jen la pli necesaj pecoj, varie kombineblaj.

Por via vespera tualetto, nia konsilo estas — ne troŝarĝu vian valizon! Unu bela silka robo kun multaj drapiraĵoj kaj tordoj, en ekzotikaj koloroj, promesas al vi grandan sukceson. Ĉi-somere tre modernaj estas grandaj dekoltajoj, forte akcentita talio kaj pufa jupo.

815



Distroj

AMUZA ZODIAKO



ĜEMELOJ
(22.05—21.06)

*Donu librojn al Ĝemelo brava!
Findroninta en scienc', sensava...
Scivolema — ĉio ekkoneblas —
en ĉi feblo lim' ne mezureblas!*

*Estas li kombinantaĉ' danĝera,
pri variaj movoj ege klera.
Sciu, famas fajna kavaliro,
tre saĝega, lert' praktika viro.*

*Do, kun li enuos neniulo
kaj ekscios multon eĉ ajnulo.
Ĉiuj estas grandaj diplomatoj,
brilas en disput' kaj puĉ' en ŝtatoj.*

*Ili tro fajnece vin ruztrompos,
mankon de informo plena rompos.
Nun por ili estus vi reĝinoj,
morgaŭ — tute simplaj azeninoj.*

*Viroj ĉi penige ekvundeblas
kaj praktike eĉ ne enkapteblas.
Ĝemelinoj ĉion satpromesos,
tamen ĉu plenumi ĝin sukcesos?*

*Ekde la naskiĝo — urĝemuloj —
kaj tielos plu ĉe la vivuloj.
Ilin ni al Taŭro atentigos!
Sed Sagitarioj ekmatigos!*

Esperantigis: Asen JOSIFOV




ARKOJ

Dekstren: (laŭ la interrompita streko) 1. Konata aktorino de Bulgara Esperanto-Teatro. 2. Maŝino, kiu transformas la meĥanikan movon je elektron. 3. Malgranda mamulo, kies dorso estas kovrita de karapaĉo. 4. Ŝarĝbesto. 5. Legomo kun manĝebla ruĝa radiko. 6. Inflamo de la mukozo de anatomia organo kun apartigo de fluaĵo. 7. Hundosimila rabobesto.

Maldekstren: 2. Vorto devenigita de alia. 3. Necese elekti unu el du aŭ kelkaj samvaloraj eblecoj. 4. Longa apogseĝo. 5. Barbira instrumento. 6. Ĉambra fajrujo. 7. Grupo da kamparaj dombestoj. 8. Lukto kun diversaj rimedoj.

Cvetan MANOJLOV

Noto de la Redakcio: Viajn solvojn ni atendas ĝis la 15-a de aŭgusto 1989. La nomon de la gajninto kaj la solvon ni publikigos en n-ro 10/1989 de „BE”.



LA PREMIOJ

Ĉi-foje la Redakcio aljuĝas du premiojn. La unua — la libro „Ruza Petro” de Sava Popov, al la aŭtoro de la krucenigmo „Mia patrolando” — hungara samideano István Takács el Marcali (Hungario). La libropremion — antologion „Nuntempa bulgara poezio kaj prozo” ricevas Ĥristo Tonev el Ŝumen pro rapida kaj korekta respondo.

La solvo de la koncerna krucenigmo, publikigita en n-ro 12/1988 estas:

Vin ame gloras mia kanto,
por vi batadas mia koro.

Ni dankas pro la senditaj respondoj ankaŭ al: Bojana Josifova kaj Enju Enev (Burgas), Vasil Georgiev (Ŝumen), Atanas Gaev (Asenovgrad), Róza Halász (Hungario) kaj d-ro Otto Kaczinski (GDR).

„BE”